Esperanto sub la Suda Kruco

Numero 2 — Marto-Aprilo 1993



Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Esperanto-Asocioj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio. ☎ (09) 574 1307.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Manuskriptoj devas esti klare tajpitaj kun duobla spaco inter la linioj. Netajpitaj manuskriptoj estos malakceptitaj. Oni povas ankaŭ sendi kontribuaĵojn sur 3«-colaj komputildiskoj Macintosh aŭ MS-DOS. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 28 Aprilo.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AUD$30 por individuo, klubo, kc; $35 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso); $20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 1007. ☎ (09)-817 8244.

Sekretario: Jo Knight, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003. ☎ (09)-846 2601

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003.

Membrokotizoj: NZ$30 por individuo; $35 por geedza paro; $15 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano, maksimume $15.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas AUD$40 (50 ned. gld.), kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Sendu pagon per internacia bankĉeko al la kasisto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio aŭ al la UEA-konto de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kun samtempa atentigo al la Libroservo de AEA.

EN ĈI TIU NUMERO:

ARTIKOLOJ:

La stranga afero de enfluoridigo (Mills) 3
La Ĉielarko (Wordsworth, tr. Jansen) 5
Memoroj pri la Somerlernejo en Adelajdo, kaj plu... 6
Deziras Korespondi 11
Neoficialaj analoj de 1992 (Horo) ... 12
Ŝaŭn kaj la Gregori-Rivero (Manley) 14
La ok-bovino edzino (Furness) 15
Lingva angulo (Towsey) 21
Ĝenerala kunsido de AEA en Adelajdo 23
Diversaĵoj 24
NZEA kongreso (Fox) 26
El la Regionoj 26
Nekrologo: Dorothy Threlfall 27

LIBROJ:

Pocket Esperanto Dictionary (rec. Harry) 16
Recenzetoj 19

English Supplement

LA STRANGA AFERO DE ENFLUORIDIGO

de JOHN MILLS

Unu el la bonaĵoj de Esperanto estas ke oni povas legi eldonaĵojn el aliaj landoj kaj tiel sciiĝi pri okazaĵoj, ideoj kaj opinioj kiuj ne aperas en aŭstraliaj ĵurnaloj. Antaŭ unu-du jaroj mi legis en *Monato* leteron kiu forte kritikis la enfluoridigon de trinkakvo. "Ho," mi diris al mi, "li estas nur reakciulo kiu ne scias ke fluorido malhelpas dentajn kariojn. Mi skribos leteron al *Monato* kaj klarigos la aferon."

Do mi demandis al dentisto kiu subtenas enfluoridigon ĉu li havas informilojn pri fluorido. Li volonte pruntedonis al mi du artikolojn. Ili estis malnovaj, kaj neniel priskribis esploradon aŭ donis statistikajn informojn; ili nur diris ke "esplorado montras" ke enfluoridigo estas bona. "Tre strange," mi pensis, "kial li ne havas pli aktualajn kaj konvinkajn informilojn?"

Mi vizitis bibliotekon kaj trovis libron de Wendy Varney kiu prezentas tute malsaman bildon ol tiun je kiu mi kredis. Laŭ ŝi ankoraŭ ne estas montrite ke fluorido malhelpas dentajn kariojn, kaj ŝi citas esploradon kiu subtenas ŝian aserton. Kaj plue, ŝi asertas ke fluorido en trinkakvo estas venena al multe da homoj kaj ke ni havas fluoridon en nia trinkakvo pro politikaj kialoj, ne sciencaj. Poste mi aĉetis libron de John Archer. Mallonga sekcio en tiu libro tute subtenas la vidpunkton de Varney. La sekvaj informoj venis el tiu du libroj.

Kiuj landoj fluoridigas la akvon?

En 1988 estis nur du landoj en la mondo—Aŭstralio kaj Nov-Zelando—kie pli ol duono de la popolo trinkas enfluoridigatan akvon. Sekvis Usono, Kanado kaj Irlando kie 50% de la popolo trinkas tian akvon, Ĉeĥoslovakio (20%) kaj Sovetio (15%). Nederlando kaj Okcident-Germanio ĉesis uzi fluoridon en 1976, post ĉirkaŭ dudekjara provado.

Ĉu fluorido efikas?


Ŝajnas ke okazis malmulte da esplorado pri efiko de fluorido en Aŭstralio. Jen informoj pri dek-jaraĝaj infanoj en aŭstraliaj ĉefurboj. La numeroj estas la meznombroj de difektaj dentoj.

Urbo	1977	1987
Sen fluorido:		
Brisbano	3.5	1.1
Kun fluorido:		
Hobarto	3.5	0.6
Kanbero	1.8	0.8
Sidnejo	2.6	0.9
Adelajdo	2.8	0.9
Perto	2.3	1.1
Melburno	4.5	1.3

Brisbano, kie oni ne enfluoridigas la akvon, havas similan dentosanon kiel la aliaj urboj kie fluorido uziĝas.

Certe la dentosano pliboniĝis ekde 1950 tra Aŭstralio kaj tra la mondo. Sed ŝajnas ke la kaŭzoj ne inkluzivas fluoridon. La grafikaĵo ĉisuba montras la ŝanĝon en Sidnejo, por infanoj inter kvin kaj dek-du jaroj, ekde 1960 ĝis 1972. Tamen, rimarku ke Sidnejo komencis uzi fluoridon nur en 1968, post la plejparto de la ŝanĝo. →

Esploro de la dentosano de infanoj en la nordaj kvartaloj de Sidnejo, 5-10jaraĝaj



Laŭ Glen Walker: *Fluoridation: Poison on Tap,* Glen Walker, Melburno 1982.

S-ro Don Everingham, Federala Ministro por Sano 1972-1975, skribis en 1977:

> Mi petis de la Departamento [de Sano] priskribon pri la scienca pravigo de enfluoridigado. Post du jaroj mi ricevis mallongan respondon ke kelkaj instancoj kaj esploradoj pruvis ke enfluoridigado reduktas dentan karion, sen pli ol malgravaj flankefikoj. Mi respondis ke tio ne estas scienca pravigo, kaj petis tion, precipe pri la aserto de Waldbott kaj Rapaport ke la simptomaro de Down asociiĝas kun enfluoridigado de akvo. Mi ankoraŭ atendas ricevi la pravigon.

Kiuj estas la danĝeroj?

Natria fluorido, kiun oni uzas por enfluoridigado, ne estas la sama materialo kiu troviĝas nature en grundo kaj en iuj trinkakvoj. Natria fluorido estas tre toksa kaj danĝera. En 1989 du tasmaniaj bienistoj sukcese procesis kontraŭ la tasmania registaro por $65 000; ili pruvis ke la morton de iliaj purrasaj bovoj kaj ŝafoj kaŭzis natria fluorido kiu likis en la grundon el la enfluoridigada instalaĵo de Port Cygnet.

Natria fluorido estas rekremento de produktado de alumino kaj aliaj kemiaĵoj. Iam la forigo estis grava problemo; nun la materialo gajnas milionojn da dolaroj por industrio, pro fluoridigado de trinkakvo.

Krom la simptomaro de Down estas raportite ke fluorido respondecas je kancero, genetikaj difektoj, longedaŭraj efikoj je la imuniga sistemo kaj produktado de enzimoj, kaj estas faktoro en tendena sinoviito[1]. Laŭ *A-Z of Chemicals in the Home,* eldonita de la Australian Consumers Association:

> Malgranda nombro da homoj, eble malpli ol 1%, estas sentiva al

[1]Angle, "RSI".

eĉ malgrandaj kvantoj da fluorido en trinkakvo.

Tamen la diferenco inter la utila dozo kaj malutila ne estas granda, kaj longedaŭra troa dozo povas kaŭzi makuligon de dentoj kaj skeletan fluoroson (ostan malsanon).

Akuta veneniĝo povas okazi kiam ĉirkaŭ dekoblo de la utila dozo englutiĝas el dentopasto. En 1984 la *Medical Journal of Australia* raportis ke 20 infanoj eniris hospitalojn pro fluoridveneniĝo ĉar ili englutis fluoridajn pilolojn.

Deviga Medikamento!

Estas malfacile eviti fluoridon en onia trinkakvo. Oni povas trinki multekostan enboteligitan akvon—sed oni ne certas ke tiu ne enhavas fluoridon. Oni povas uzi retroosmozan filtrilon por forigi fluoridon el la akvo. Tio multe kostas: tipe $400 por malgranda filtrilo sufiĉa por unu familio.

Ĉu iu registaro rajtas devigi homojn engluti medikamenton? En Aŭstralio ni fanfaronas nian liberecon, sed devigi medikamenton estas ago nur de totalisma registaro.

La gajnoj pro fluorido, post tridek jaroj, ankoraŭ ne estas pruvitaj, krom por la kemiaĵprodukantoj. Estas grave maltrankvilige ke fluorido en la trinkakvo difektas la sanon de multaj homoj.

En pasintaj jaroj la homaro uzis multajn san-rimedojn kiujn ni nun kredas senutilaj aŭ eĉ danĝeraj, ekzemple sangigadon, ricinoleon, klorofildentopaston, tranĉadon kaj premligilon por serpentmordoj, Talidomidon[1], ktp. Do, ĉu ni ne nun devas forigi fluoridon, same kiel oni forigis tiujn aliajn erarojn?

Referencoj:

Archer, John: *On the Water Front.* Pure Water Press, Sydney 1991.

Diesendorf, Mark: "The health hazards of fluoridation: a re-examination" kaj "Have the benefits of water fluoridation been overestimated?" *International Clinical Nutrition Review,* vol. 10, no.2, aprilo 1990.

Varney, Wendy: *Fluoride in Australia: a Case to Answer.* Hale & Iremonger, Sydney 1986.

Walker, Glen: *Fluoridation, Poison on Tap.* Glen Walker, 1982.

[1]Thalidomide ❑

LA ĈIELARKO

de Wordsworth

TRADUKIS TONNY JANSEN

Mia koro saltas kiam mi vidas
La ĉielarkon en la ĉielo
Estis tiel kiam mia vivo ekiĝis
Estas tiel nun, mi tamen viro
Estu tiel kiam mi oldiĝos, aŭ mi mortiĝu
Infaneto estas patro de la homo
Kaj mi volus miajn tagojn esti
Ligitaj ĉiu-al-ĉiu de natura pieco.

MEMOROJ PRI LA SOMERLERNEJO EN ADELAJDO, JANUARO 1993, KAJ PLU...

De Vera Payne:

Prefere oni ne tro "mirinda-etoso!"-u pri la Somerlernejo, sed vere malfacilas ne troigi, ĉar la dusemajna kursaro kreskas "fort'-al-forte", kaj tiu ĵus finiĝinta, laŭ la opinio de multaj, elstaris. Kaj jes, harmonio kaj kunlaboremeco regis. Kolektiĝis 72 untaj "lumiloj", inkluzive de 3 el Koreo[1], 4 el Japanio (unu el tiuj, Iranano), 9 el Pollando, 2 el Svedio, 1 el Hungario, 1 el Nov-Zelando kaj la ceteraj el ĉiu ŝtato kaj teritorio de Aŭstralio, escepte de el Tasmanio.

Pro la daŭra reklamado fare de la nelacigebla Max Wearing, kiu cetere sin okupis multflanke dum du jaroj por ke la afero nepre sukcesu, ĝi ja sukcesis plenkontentige. Kompreneble ne indas fanfaroni pri kvanto sen kvalito, kaj la kvalito ne mankis. Male, ĝi abundis. La studantoj elektis inter kvar "kernaj" niveloj. Pluraj fakte ĉeestis du kursnivelojn, do ili sorbis lecionojn dum 6 horoj ĉiutage!

Kvankam mi ilin ne ĉeestis, la sukceso de la du meznivelaj klasoj videblis pro la plenaj ĉambroj, kaj espereble iu alia priraportos ilin.

La sugestopedian klason por komencantoj ĉeestis i.a. tri monaĥinoj kaj unu biskopo[2]! Nu, verdire ĉeestis tri tre ĉarmaj monaĥinoj, kaj Alan Bishop, profesoro pri Eduk-Matematiko ĉe la Monash Universitato. Alan kaj edzino Jenny—ankaŭ instruisto, delonge Esperantisto kaj nun, kun Svetislav Kanaĉki, prizorganto de la 3ZZZ-Esperantoprogramo en Melburno—venis al ni el Cambridge, Anglio. Ni, kaj precipe Viktorio, ĝoju pro la elstara aldono al nia movado. La paro ankaŭ aktoras, muzikas kaj sorĉe bele amikemas.

En la sama klaso partoprenis la Prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio, kiu tute ne scipovas la anglan, kaj lia amiko, kiu bone regas la anglan sed estis novulo pri la Internacia Lingvo. La ĉarmaj ridetoj kaj bonvolo de ambaŭ samideanoj tre allogis. La tri Japaninoj inkluzivis junulinon kiu parolis tre ĝentile sed mallaŭte kaj iom heziteme la anglan, sed ne Esperanton, kaj ŝian patrinon kiu komprenis nek la unu lingvon nek la alian. Ni konsciu kiom streĉe devas esti por homoj ekster sia propra lingvomedio, kiuj ankaŭ strebas lerni ankoraŭ alian fremdan lingvon! Sendube ili suspiras dankeme hejmenreveninte.

Kvar gejunuloj, 12-15-jaraĝaj ankaŭ ĉeestis. Do, ne la tuta gamo de eblaj komencantoj, sed larĝe diversa grupo de pli ol 20 ĉiuvespere. (Kaj la listo de profesioj/okupoj certigis interesajn konversaciojn!)

Ni suprensaltu mense al la 4-a ni-

---

[1]En sia manuskripto Vera Payne skribis "Koreujo", kaj aparte komentis ke la anoj de tiu lando preferas "Koreujo" aŭ "Koreio", anstataŭ "Koreo" kiel la landnomon, malgraŭ la rekomendoj de la Akademio. Mi do mem kulpas pri tiu ŝanĝo de ŝia teksto (kaj, kompreneble, Odlo Bokserp pri ĉiuj aliaj ŝanĝoj)—Red.

[2]Ĉi tiu vorto estas © Vera Payne, 1993. Pri ĝia signifo demandu al ŝi.—Odlo B.

velo. Tiu "titolo" ne plaĉis al D-ro So, sed ni ne trovis pli belan. Aparta plezuro ĉi-jare estis trovi inter ni la unuan, eksterlandan "vizitantan profesoron", D-ron So Gilsu el la Korea Respubliko. Ne nur tute flue regante Esperanton, sed kun aperta personeco kaj superabunda energio, So ĝuis de ni la plej altan takson. Li lekciis diversteme, ekzemple pri la "Sana Vivo, Kontenta Vivo, Feliĉa Vivo", pri Homaranismo kaj Homara Ekonomiko, pri la Utopio de Konfuceo, eĉ pri "gedormado"! Vigla diskutado ofte ekflamis, kaj So komentis al mi (dum sia restado en Perto) pri sia surprizo je la abunda energio kiu estiĝis en tiu grupo.

La alian tempo-duonon je tiu nivelo ni elspezis pricerbumante *La Bona Lingvo* de Claude Piron. (Vi povos legi tiuteman artikolon en la venonta numero de *ESK*.)

Laŭplaĉaj kursoj haveblis tuj postlunĉe. Margaret Chaldecott gvidis la legadon de Valanaj verkoj.

Kompreneble oni ne ĉeestaś somerlernejon nur por sklavi. Indas ludi kaj diversmaniere sin distri. Ankaŭ tiucele la aranĝoj ne desapontis. Ĉiun vesperon gastparolantoj maltedis la liberulojn. Oni frandis la saĝajn kaj spritajn vortojn de eminentuloj kiaj niaj Ralph Harry, Kep Enderby, kaj el *Monda Turismo*, Andreo Grzebowski.

La unuan vendredvesperon ĉiuj liberiĝis de klasoj por partopreni en la Solena Malfermo de la du-taga Aŭstralia Kongreseto. (Laŭleĝe ni devas okazigi jarkunvenon pro la korporaciiĝo de nia Asocio.) Parolis elokvente D-ro Petro Ellyard, angle ĉar ĉeestis kelkaj gastoj neesperantistaj. D-ro So Gilsu, digne vestita en sia nacia kostumo, parolis en Esperanto kaj Ralph Harry tradukis. La ceremonio okazis en la grandioza Adelajda Kunven-Centro, kiu verŝajne en 1997 fariĝos la kongresejo por la unua UK iam ajn okazigita en Aŭstralio. D-ro So kuraĝigis nin akcepti la eventualan inviton de UEA. Post kiam ni rigardis mallongan filmon pri la kunvenejo kaj pri la ĉarma urbego kaj la ĉirkaŭaĵoj, oni regalis nin per trinko kaj manĝeto, kaj ni ĉirkaŭiris la ĉefan salonegon de la impona konstruaĵo.

Reza Kheir-Khah, Iranano nun loĝanta—kun sia edzino Ecuko, kiu ankaŭ ĉeestis la somerlernejon kun la patrino kaj la fratino—en Japanio, impresis kaj per sia *Najtingalo* serio de kasedoj—la unua songazeto el Azio, kaj per siaj lekcio kaj elmontro praktika pri la "diina masaĝo" kiu restarigas bonan sango-cirkuladon.

Posttagmeze oni povis elekti el diversaj ekskursoj, ekzemple al la botanika kaj zoologia ĝardenoj, al Tandanya, al Glenelg, al la ĉirkaŭa (norda) parto de la urbego, al la malnova parlamentejo, al bierofarejo, al la muzeo, bibliotekoj, artgalerioj—eĉ al la kazino. Oni sapskatolis. Oni geamikis, kantante kaj dancante, ĉe la loka drinkejo kie Max eĉ Esperantistigis aron da nesamideanoj, tiel ke post 10 minutoj ili belkantis plenharmonie en perfekta Esperanto!

Ĉiutage, je la unua, oni povis frandi diversajn filmojn en Esperanto (inkluzive de *Mefisto*, antaŭnelonge ofertita per SBS), dank' al Max kies posedaĵo la bendoj estas, kaj al Terry Manley kiu funkciigis fidele la videoaparaton. Terry ankaŭ gvidis ĉirkaŭaĵpromenojn kaj popoldancadon.

Dum diapozitiva vespero la du ĉarmaj svedinoj kiuj partoprenis, Anita kaj Agneta, parolis pri sia restado en Afriko. Post "ĝemeliĝo" de la Esperanto-Asocioj de Tanzanio kaj Svedio,

la du virinoj, kun tria kunulo, safariis[1] ĉe Kilimanĝaro, tra la Serengeto, kaj en diversaj aliaj lokoj.

So Gilsu (kaj aliaj) vizitis Kanguru-Insulon kaj Coober Pedy. Li dufoje en la semajno telefonis hejmen por fari rektan intervjuon kun Seoula Radio pri sia vojaĝado en Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

Dimanĉmatene grupo ĉeestis diservon ĉe la Kvakera kunvenejo, kaj samtempe gratulis al Max kaj Beth Wearing, kiuj tiutage festis sian 29-an geedziĝfestotagon.

Barbara Bruer kaj la du denaskaj Esperantistetuloj Michael kaj Heather ("Mi pretas teni ĉies manon—eĉ la vian!") ĉarmis per sia familia distraĵo.

Cam Lee reĝisoris "tujan-teatraĵeton"; Alex Dembski ludis diĝeriduon kaj pianon; li kaj Kay Andersen gvidis ĥoron.

Jean Lehane, la instiganto de la unua Aŭstralia Somerlernejo (ĉe Toowoomba), prizorgis lernilojn inkluzive de ludoj kaj puzloj.

Virginia Lampe zorge prizorgis la librovendejon/ĝeneralan servon ĉiutage, kaj eĉ restis freŝa kaj laborpreta por partopreni en la vesperaj klasoj.

Kiel memoraĵon de nia feliĉa kunesto ni refoje postlasis arbeton (kutimo inaŭgurita en Sidnejo lastjare, laŭ sugesto de Marg Chaldecott); ĉifoje belan ginkon plantis Margaret Furness (Prez. de SAEA) kaj Kep Enderby (Prez. de AEA) en la Parko de Paco. Forte kaj longe ĝi kresku!

Ni bankedis vegetare kaj kvankam la vetero estis varmega, tia ankaŭ estis la bonvolo. S-ino Idyss Einihovici okazigis aŭkcion (kiun estris Ziggy Wybraniec) kaj per ĝi kaj alimaniere ŝi havigis plurajn centojn da dolaroj al la Einihovici Fonduso.

Ĉiu atendis antaŭĝue novaĵleteron *La Lumilo* kiun redaktis Bob Felby kaj Colin Giles. Laŭ aspekto kaj enhavo, gratulinda eldonaĵeto. ABC, SBS, kaj Kanalo 7 faris televidprogramerojn por siaj novaĵelsendoj.

Sukcesa entrepreno kia tiu somerlernejo ne eblas sen la daŭra sindediĉo kaj sinofero de multaj helpantoj kaj gastigantoj, kaj mi pardonpetas, ke mi ne pernome menciis ĉiun mencindan; certe mia raporto ne estas kompleta. Sen la daŭra kaj malavara entuziasmo de la partoprenantoj en la diversaj klasoj restus nur seka, sensuka lecionaro. Al ili, kaj al la manpleno da laboregantoj adelajdaj, kaj speciale al Max Wearing kies nomo sinonimas "Esperanto-Somerkursaron", gratulojn kaj dankojn tutkorajn.

[1]Safario: ekspedicio en sovaĝa teritorio, dum kiu oni serĉas sovaĝajn bestojn.

De Idyss Einihovi

Ĉifoje la Esperanto-Somerkursaro en Adelajdo altiris studantaron el diversaj landoj: Svedio, Japanio, Hungario, Koreo, Pollando, Usono kaj Nov-Zelando por studi Esperanton kaj ĝui esperantan etoson. Ĉeestis 72 entuziasmaj gestudantoj.

Nia AEA-prezidanto Kep Enderby kaj Dorothy estis nia instigo kaj inspiro.

La elementaj klasoj gvidataj de Vera Payne kaj Shirley Gradussov laboregis ses horojn ĉiutage en la klaso, por lernigi entuziasmajn gestudantojn.

En la grupo por progresantoj ĉirkaŭ 30 gestudantojn gvidis Profesoro So el Koreo. Liaj personeco, saĝeco, scio de la lingvo, kaj humuro estis vera ĝojo. Dum lecionoj oni diskutadis laŭvice kaj multe ridis.

Vera Payne ankaŭ ĝojigis nin ĉiu-

tage per legado de la libro de Claude Piron *La Bona Lingvo* (kiun mi tre rekomendas). Tiun libron ni legis ronde laŭvice kaj avide diskutis. La stilo, filozofio kaj humuro faris lecionojn ĝuindajn.

Inter la gestudantoj en la elementa klaso troviĝis mezaĝa profesoro pri matematiko ĉe Monash Universitato en Melburno, kiu tre entuziasmiĝis pri Esperanto. Li rimarkigis ke matematiko ankaŭ estas internacia studobjekto. S-ino Jana Bogojev kiu estas muzikistino komencis lerni Esperanton kun amo, konsiderante muzikon kiel ĝemelon de Esperanto.

La plej ĝoja ero dum distra vespero estis kiam gefratoj Davido, 5-jara, kaj Heather, 3-jara, prezentis lecionon en Esperanto. La frato Davido lernigis al sia fratino Esperanton. La prononco de la infanoj estis mirinda kaj perfekta. Iliaj gepatroj Barbara Bruer kaj edzo uzas du lingvojn hejme. La patrino uzas nacian lingvon (anglan) kaj la patro Esperanton, tiamaniere ke la infanoj kreskas parolante dulingve antaŭ ol komenci lernejstudojn. Neforgesebla evento en Adelajdo!

Inter la ĉeestantoj estis du fraŭlinoj el Svedio kiuj antaŭe vojaĝis en Afriko kaj partoprenis en afrikaj esperantaj kunvenoj. Ili prezentis vidbendojn pri sia vojaĝo tra Afriko. Vidaĵoj en Afriko kaj la naturo estas bunta, interesa, kaj eduka sperto. Neforgesebla travivaĵo dum la Esperanto-somerkursaro.

Inter aliaj ĉeestantoj troviĝis kelkaj emeritaj instruistoj kiuj ne sciis pri Esperanto antaŭe. Ili plendis kaj bedaŭris ke oni ne instruas Esperanton en lernejoj. La manko de la esperanta lingvo kaŭzas multan malfeliĉon. La viktimoj estas pacientoj en hospitaloj kiuj ne povas komuniki kun kuracistoj nek geflegistoj por indiki simptomojn kaj suferojn.

Dum bankeda vespero okazis aŭkcio por fortigi la Vojaĝfonduson por Junuloj. Oni kolektis $400.

La viglajn, entuziasmajn parolantojn Ralph Harry, Peter Ellyard, Kep Enderby kaj aliajn ĉiam prezentis verve Max Wearing.

Kep Enderby, nia esperanta motoro, dum la adiaŭa vespero disdonis 9 atestilojn laŭdante ĉiu studanton. Mi eĉ ricevis kison de li. Li anoncis la daton de la unua Universala Kongreso en Aŭstralio, 1997, okazonta en Adelajdo en la Kongresa Halo. Ni preskaŭ saltis pro ĝojo. La ovacio kaj aplaŭdo daŭris longe.

Kaj Max Wearing raportas el la Kuirejo:

La 9-a Aŭstralia Esperanto-Somerlernejo estis la plej granda ĝis nun, kaj ĝi entenis kelkajn ŝanĝojn: okazis kernaj kursoj je 4 niveloj (anstataŭ 3); ĉeestis 72 homoj el Aŭstralio plus 20 el 7 aliaj landoj (Pollando, Svedio, Hungario, Irano, Koreo, Japanio, kaj Nov-Zelando); unu el la ĉefinstruistoj estis alilandano; okazis AEA-Kongreso dum la semajnfino; kaj dum tiu mallonga kongreso, oni decidis inviti la Universalan Kongreson al Adelajdo en 1997.

De kie venis tiu freneza ideo?

Evidente la plej grava novaĵo el la AEA-kongreseto estas la decido okazigi Universalan Kongreson en Adelajdo en 1997. Sciante ke ankoraŭ restas akraj sentoj pro fiasko de planoj havi UK-n en Brisbano en 1988, sendube kelkaj aŭstraliaj esperantistoj scivolas pri la origino de la propono por 1997.

Ŝajnas, ke la nuntempa instigo venis de ekster la Esperanto-movado.

En 1991, la Kongresejo de Adelajdo ("Adelaide Convention Centre") de-

cidis dungi reprezentanton en Eŭropo, Ameriko, kaj Azio. La dungito por Eŭropo estas juna Alĝeri-devena franco, Medhi Hemici, kaj lia tasko estas serĉi internaciajn grupojn, kiuj pretas okazigi kongresojn en fora ekzoktika Adelajdo.

La unua ideo de Medhi temis pri Esperanto, ĉar hazarde li iam studis en progresema lernejo en Oksfordo, en kiu iu nekutima instruisto parolis entuziasme pri planlingvoj. Medhi tuj telefonis al la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo kaj aranĝis intervjuon kun ties Direktoro Ĝenerala, Simo Milojević.

La estroj de la Adelaide Convention Centre volonte subtenis la proponon de Medhi; ĉar ili jam parolis kun mi, vidis programon pri grandega UK en Varsovio en 1987, kaj aŭdis, ke la urbo Brajtono (Anglio) donis senpagan tutsemajnan uzadon de sia fama kongresejo por la UK de 1989. Medhi kaj mi interkonatiĝis nur poste, en majo 1992, kiam ni ambaŭ estis invititaj (kiel ankaŭ Simo Milojević) al bankedo por festi la 5-an datrevenon de la malfermo de la Adelaide Convention Centre.

Kompreneble ekzistas la problemo, ke julio estas la sola monato, dum kiu kutime pluvas en Adelajdo. Eble UEA refoje bedaŭros la neokazigon de UK en Brisbano en 1988, dum kiu la vetero estis perfekta.

Ŝanĝoj en niaj aranĝoj

Tiuj, kiuj okazigis la unuajn Esperanto-kongresojn en Aŭstralio esperis, ke la aranĝo fariĝos ĉiujara kaj daŭre translokiĝos de unu ĉefurbo al alia; sed malhelpis militoj kaj malrapida kresko de la movado. Ekde 1977, tamen, la aŭstralia Esperanto-movado aranĝas, ĉiun duan januaron, landan kongreson en malsama urbo, kaj en la aliaj januaroj landan somerlernejon, restantan kelkajn jarojn en sama urbo.

Tiu estas preskaŭ la sama kutimo kiel tiu, kiun havas Usono, krom ke en Usono la kongreso kaj lernejo ambaŭ okazas ĉiujare anstataŭ ĉiu-dujare. Ankaŭ ekzistas en Usono ripetiĝanta sinsekvo de aranĝoj, kiu instigas Esperanto-turismon: 3-semajna lernejo en San Francisko estas sekvata de 1-semajna kongreso de ELNA tuj antaŭ la Universala Kongreso, kiu plej ofte okazas ie en Eŭropo.

Kun la decido inviti al Adelajdo la UK-n por 1997, alvenas la okazo duobligi la oftecon de landaj Esperanto-aranĝoj en Aŭstralio, por ke tiu ofteco atingu tiun en Usono. La sola kialo por akcepti la laboregon okazigi UK-n en Aŭstralio estas pligrandigi la movadon en nia propra lando, ĉu ne? Ni esperu, ke post la UK en 1997 ekzistos sufiĉe da Esperanto-aktivado por necesigi almenaŭ unu kongreson kaj unu lernejon ĉiujare en ĉiu regiono de nia lando, kaj ke ekzistos dekoj da aŭstraliaj Esperanto-familioj kaj Esperanto-kursoj en lernejoj, kaj daŭra fluo de esperantistaj vizitantoj el landoj tra la tuta mondo.

Kio, do, fariĝu nia nova agadmodelo por la tuja estonteco? Adelajdo jam anoncis, ke ĝi pretas daŭrigi la somerlernejon ĉiujare (anstataŭ ĉiun duan jaron) dum la 2-a kaj 3-a semajnoj de januaro (tuj post la Nov-Zelanda Esperanto-kongreso, kiu jam okazas ĉiujare dum la unua semajno). En 1993 la Somerlernejo ankaŭ entenis semajnfinan kongreseton, kaj por 1994 Sud-Aŭstralio organizos plurtagan kongreson dum la dusemajna somerlernejo.


Kio estu la agadplano por 1995 kaj 1996 ktp? Januaro ne estas la plej bo-

na monato por eksterlandaj vizitantoj por veturi tra ĉiu regiono de Aŭstralio, kaj ĉiukaze la UK en 1997 okazos en julio. Ekzistas bonaj kialoj por okazigi ĉiujaran aŭstralian Esperanto-kongreson dum iu malvarm(et)a monato. (Unu sugesto dum la somerlernejo de 1993 estis ke, de tempo al tempo ĝi okazu eĉ ekster la landlimoj de Aŭstralio—ekzemple en Balio aŭ Nov-Zelando). Ni devas tuj pensi pri la nova agadmodelo, ĉar daŭra allogado de eksterlandaj vizitantoj al niaj aranĝoj postulas, ke ni anoncu ilin en internaciaj gazetoj almenaŭ unu jaron antaŭe.

Ni devas pensi ankaŭ pri la tuta programo de Esperanto-aranĝoj por 1997. Tradicie la UK estas ĉirkaŭita de ĉiujaraj aranĝoj tuj antaŭ kaj tuj post tiu kongreso—ne nur la oficialaj Antaŭ-Kongreso kaj Post-Kongreso de UEA, sed ankaŭ la ĉiujaraj kunvenoj de organizaĵoj kiel ekzemple TEJO, ILEI, SAT, kaj Monda Turismo. Se aliaj urboj en nia lando kaj la ĉirkaŭaj regionoj povos allogi tiajn aranĝojn por 1997, ankaŭ ili povos profiti de la propagando pri la UK.

Kiu pretas alfronti la defiojn? Ekzemple, ĉu iu grupo pretas okazigi AEA-kongreson dum iu malvarm(et)a monato en 1995 aŭ 1996?

Interesa Citaĵo: "La Internacia Lingvo ne havas sencon en nacia kadro. Ĝi iĝas ludo senbezona. Ludo—de kiu oni laciĝas, kaj kiun oni finfine forlasas." (Simo Milojević en salutletero al kongreso de la REU. ❑



Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalajn leterojn de la ĉisubaj korespondemuloj oni povas havigi ĉe tiu adreso.

- San Narun, #232 E,.130 Str. Kromti sangat-phsar Thmeiti 3, khan Donpenh, Phnompenh, Kampuĉeo. 21-jaraĝa; amas Esperanto-leterojn bone skribitajn.
- Bhagvan Pradhan, 1-560 Kalikasthan, Dilli Bazar, Kathmandu, Nepalo. 21-jaraĝa, lernas de 5 jaroj, interesiĝas pri multaj vivtemoj.
- Borisova Nelli, ul Volgogradslaju 9H/32 Krasnojarsk, 660069 Siberio. 16-jaraĝa.
- Ausra Bauzinskaitekuncu 4-24, 5322 Klaipeda, Litovio. Juna, amas lingvojn.
- Abraham López, Limonaras #119 Fracc. Trinidad de la Havre C.P., 68000 Oaxacaox, Meksiko. 18-jaraĝa. Amas futbalon kaj rok'n'rolo-muzikon.
- Sórés Judit, 4224 Bodaszõlõs, Vincellèr u 13, Hungario. Komencanto. Kolektas bildkartojn.
- Raimo Tuisku, Puistotie 81 C14, 04430 Järvenpää, Finnlando.

NEOFICIALAJ ANALOJ DE 1992

DE ROLO

En 1992, la Jaro de la Medio, la tuta mondo spertis ekonomiajn kaj sociajn traŭmatojn, ligitajn kun la ekologio.

En Aglolando daŭris batalo inter tiuj verduloj, kiuj deziris savi la arbustojn, la koturnojn kaj la elefantojn, kaj la verdirantoj kiuj preferis kuraĝigi la azenojn. La azenamikoj venkis kaj la arbustamantoj povis nur pardoni siajn amikojn. Tria kandidato en la prezidenta elektkampanjo ne estis verdiranto kaj simple pereis. Tuj antaŭ la fino de la jaro la aglolandanoj decidis, kun la permeso de Unuiĝintaj Nazioj, sendi kelkajn marsoldatojn por pasigi iom da tempo en la Korno de Afriko, kie la somaloj havis pli da grenadoj ol grenoj aŭ grenadiloj. La kornuloj bonvenigis la aglolandanojn, kvankam ili suspektis la blukaskulojn.

En Eŭropo en 1992 estis du movadoj—unu por unuigi la kontinenton la alia por ĝin dispecigi. En la Eŭropa Komunumo oni voĉdonis pri paŝoj al plena posedo kaj verdeco—pri la tielnomita Traktato de Mosanrajto. La Nordaj Danoj diris al si "Esti aŭ ne esti, jen la demando" kaj diris "Ne!". La Irlan-danoj kaj la Nederlan-danoj diris "Jes!". La unuigitaj germanoj diris "Jes, ja!". La trikoloraj urbanoj diris "Jes, Jes", sed la trekoleraj kamparanoj voĉdonis per siaj vagonoj kaj bestoj, kiuj plenigis la stratojn kaj diris "Ne! Ne! al ĉiuj neoleĝismoj! Ni savu la kampojn!" La brutoj preter la markolo diris diplomate "Eble! Se oni aljuĝos al nia kara Stellingvo divorcon de la tro postulema Marko". Kaj oni dekretis tuj ke estu separo de la paro.

En Brutio, post la lordinigo de Margareta la Ferulino, la registaro devis savi la medion, kaj ŝpari monon, per la fermo de terminaroj. Oni elspezis tro por la privilegio malpurigi la kamenojn per karbabomeno. Sed la terminaristoj ĉiam amas la laboron, kiam ĝi estas minacata, kaj la Ministoj de la Registaro, la Reĝina Konsilio, kompreneme decidis ne fermi ĉiujn disajn putojn aŭ disputojn. La ĉefa traŭmato de la brutoj fakte rilatis al la reĝina familio. Dum la duka reĝinedzo daŭrigis sian laboradon por savi la faŭnon de l' mondo li ne kapablis savi la edzrilatojn de siaj gefiloj. La tripluma Princo ne povis tenadi la intereson de sia juna princino kiu preferis loĝi en sia propra kastelo. Supozeble por pagi la impostojn per kultivado de legomoj, oni penis krei varmegan domon en la Kastelo de Vindzoro, kie estis en la epoko de Ŝekspiro gajaj edzinoj (sed kie vidvino loĝis en la lastaj jardekoj de Viktoria). Bedaŭrinde la forno estis tro varma kaj okazis incendio en kiu pereis ne nur malbelaj donacoj de ŝtatĉefoj de aliaj landoj sed kelkaj belaj verkoj de brutaj pentristoj.

En Taŭrolando 1992 estis la jaro de la Olimpiaj Ludoj kiuj okazis en la ĉefurbo de la katalunoj. Kiam oni elpafis la sagon flamantan en bovegon estis multe da oleo en la stadiono. La reprezentantoj de la amaskomunikiloj partoprenis amase preskaŭ same kiel la atletoj. Apude estis la Mediteraneo, kies maran medion la teranoj tre amase malpurigis. Sed, kvankam la katalunoj kaj la taŭristoj ne pri ĉio


konstante konsentis, je la fino de la laŭdoj oni kantis, ke ĉiuj estos amikoj por ĉiam. Oni eĉ invitis la Universalan Kongreson al antikva sud-Valencio en 1993.

En Orienta Eŭropo oni malunuigis. Post la malapero de Unuigita Ursolando organiziĝis diversaj ursidoj kiaj Blankursio, Nudkranio, Latunio, Estonteco, Litanio, Georgio (kvankam kelkaj georgianoj en aglolando protestis, ke ili ekde jarcentoj proprietas tiun nomon!) Azerbajĝingo, Mongolismo k.t.p. Post granda bumo en Jugoslavio ĉiu etna grupo eksplode klopodis starigi sian propran mondon, purigitan de aliaj etnoj. Tiel kreiĝis Slavinio, Kroĉetilo, Boŝanio, Cerbetio, kaj Makrodontio (kvankam pri ĉi tiu pranepoj de Aleksandro kaj Filupo en Grakio protestis)...

Dum la jaro estis multaj celebradoj kaj solenaj okazoj por rememorigi la 500-an datrevenon de la tielnomita malkovro de Ameriko fare de Kristoforo Kolumbo la Detektivo. Sed la indiĝenoj de kaj Nord- kaj Sud- kaj eĉ de Centr- Ameriko laŭte protestis, ke iliaj landoj estis bone konataj, de ili, jarmilojn antaŭ la jaro 1492 kaj ke la alveno de Koko nur malutilis al iliaj medioj. Tial post la Montpinta Kongreso pri la Medio, Unuiĝintaj Nacioj decidis nomi la jaron 1993 "La Jaro de la Arbogajnaj Popoloj".

En Kangurulando, tiu kontinento flaŭr-oza kaj faŭn- oza, oni arde luktis en 1992 por protekti la medion. Post la malapero de la feroca akcipitro la povra pavo povis promeni eminente kaj malpli timide. La Ĉefministo mem, en sia kitineca jako, permane subtenis la malaperontan reĝinan birdon, kiam ŝi faris flugantan viziton al la kontinento. Oni prokrastis la balotadon por nova parolamendo ĉar ĉiuj politikistoj timis la verdulojn. Ĉi tiuj svarme kaj larme invadis la arbarojn kaj registarajn oficejojn kvazaŭ riveralgo. La arboĝenantoj de Aŭstralio (kiuj malkovris sian landon antaŭ miloj da jaroj) daŭre postulis la redonon de Aŭstralio al ili. Kaj fine la Alta Kortumo decidis, ke la kontinento ne estis nenies tero *(* en juĝista lingvo *nenies lando)* kiam la blankblankuloj alvenis por organizi la golfon apud sidejo havena en 1788. Eĉ oni redonis kelkajn ne tro verdajn terpecojn al la pranepoj de la antikvaj nomadoj.

Nur la Esperantistoj laboradis por purigi la mondon per lingvo sen sakraĵoj sed ne tute sen disputoj. Estis unueca ekspozicio en Rio de Ĵanejro, kie oni parolis nur la verdon. Sed aliloke la neologamantoj batalis kontraŭ la fundamentuloj, kaj ĉiuj kiel kutime kritikis la Estraron kaj la Akademion. Sed la Kangurulandanoj kaj Kivilandanoj, unuiĝis (eĉ enuiĝis) en kongresa seminaro pri "Ekologio, la alia verda movado". Kaj la kivilandanoj decidis, por ŝpari paperon kaj tiel arbojn, unuigi sian gazeton kun tiu de la kangurulandanoj. La nomo de la nova verda organo estos: "Esperanto Sub la Suda Kruĉo". Pro la bruego kaj la alta kosto de vodko en orienta Eŭropo U.E.A. en 1992 kongresis en Vino. Oni eĉ denove diskutis la dezirindecon de kongreso en sportoza Kangurulando, spite al la krokodiloj, la dundioj de la kontinento, se nur la prezo de la biero restos malalta. Oni ankoraŭ diskutadis la aferon kiam 1993 alvenis. ❑



ŜAŬN KAJ LA GREGORI-RIVERO

DE TERRY MANLEY

Biciklante de Berktaŭn (Burketown) al Gregori (Gregory) en la regiono nomata la Golfo de Karpentario (Gulf of Carpentaria) mi elektis tenduman lokon apud la Gregori-Rivero, nur ducent metrojn for de la malofte uzata vojo. Dum la frua mateno fulmotondris kaj pluvegis. Ĉi tio malsekigis la nigran grundon, kiu iĝis treege glua. Estis tre malfacile eĉ atingi la vojon. Mi klopodis bicikli laŭ la glua vojo, sed helikrapide. Alvenis ŝarĝaŭteto kun ŝarĝo de vakeroj.

"Ensaltu!" ili diris.

Mi ne povis vidi eĉ spaceton, sed baldaŭ ili flankenmoviĝis por fari sufiĉan por mi kaj mia biciklo. La veturigisto akcelis la motoron, la radoj glite turniĝis kaj la aŭto fiŝvoste daŭrigis.

La celo de la vakeraro estis la trinkejo. Ili ne povis labori en la malsekaĵo, do kion alian ili povis fari krom trinki? Nuntempe mi malofte trinkas alkoholaĵon, sed je tiu okazo mi decidis aĉeti trinkojn por miaj savintoj. Laŭ la Aŭstralia tradicio ili ankaŭ aĉetis trinkojn por mi.

En la trinkejo mi renkontis Ŝaŭnon, Irlandan koboldulon, kiu penis vendi sian libron *Senmona Ribelanto* (*Rebel Widout A Quid*). La libro temas pri liaj adventuroj laŭ la Gregori-Rivero en kaŭĉuka boateto. Ankaŭ ĝi enhavas poemaron pri liaj travivaĵoj.

La trinkejo estis la sola ejo kie oni povis aĉeti manĝon aŭ trinkon en Gregori. Baldaŭ mi konstatis ke ŝajnas ke ĉio kostas du dolarojn. Ujo da bi-ero, pano, litro da lakto, ladskatolo da fazeoloj...

"Kiom kostas?" oni demandis.

"Du dolarojn, mi petas," estis la senŝanĝa respondo.

Post la babilado kun novaj amikoj mi forŝprucigis de mia biciklo la koton kaj iris al la rivero por trovi tendumejon. La urbeto Gregori estas sufiĉe for de la maro ke oni ne tro maltrankviliĝas pri la ĉeesto de salakvaj krokodiloj...sed oni devas vigli ĉiam. Dum mallumiĝo Ŝaŭn venis al la rivero kaj ni parolis apud la kampadfajro. Li sciigis min, ke la vojo restos neveturebla dum du aŭ tri tagoj.

La venontan matenon ni remis en la boateto de Ŝaŭn kontraŭfluen kaj provis kapti fiŝon, sed sensukcese. Revenante al nia tenduma loko Ŝaŭn rimarkis, ke la rivero plialtiĝis iomete kaj li konsilis, ke estos saĝe ke ni translokiĝu al la alia flanko de la rivero, ĉar tie situas pli alta riverbordo kaj plejgrave la trinkejo. Ŝaŭn transiris la ponton sed mi restis, ŝercdirante, ke mi ne volas movi la tendon! Ankoraŭ la rivero plialtiĝis.

Post iom da tempo mi sekvis Ŝaŭnon kaj starigis mian tendon inter turistaj ruldomoj kaj tendoj ĉe la alia flanko. Posttagmeze ni ĉiuj rigardis dum la ponto subakviĝis. Ankoraŭ la rivero plialtiĝis.

Vespere ni ĝuis kuneston ĉirkaŭ la kampadfajro kiel parolantaj malnovaj amikoj. Sed "Kio okazas nun?" iu demandis. "La trinkejestro venas por forpreni sian pumpilon apud kiu ni

WINDOW ON THE WORLD

USA: The Modern Language Association held its yearly conference in Manhattan 27-29 Dec 1992. Under the auspices of the American Association of Esperanto Teachers an Esperanto session was held, including papers on "Esperanto as the catalyst for the romanization of Chinese", "Esperanto in college: direct and indirect methods", and "Esperanto for gifted children: a quick start on foreign language learning." [From *esperanto/usa* 1992(5).]

Aviation: In January 1992 73 passengers on an Avianca airplane died when the plane crashed in New York. The Department of Transportation blamed the crash on language problems. The Columbian pilot, who spoke English poorly, reported to the control tower that he was running out of fuel, but he was unable to make the control tower understand that the situation was urgent. "His messages didn't make it clear that the situation was urgent, because he didn't use standard phraseology," the Department of Transportation declared. The DOT said that such language problems are common in the northeastern U.S. air corridor. [From *ELNA Update*, 1992(3).]

Chess: The Esperanto International Chess League (Esperanta ĉak-Ligo Internacia) will hold a World Championship Singles Festival in Romania this year. The League also organizes the "Green Chess Olympics" every four years. The Third Green Olympics took place in Podebrady (Czechoslovakia) in 1991, with 72 players from 10 countries competing. The Fourth Green Olympics will be held in 1995 in Hungary. Address for information: Saulius Miliunas, Partizanu 154-1, 3041 Kaunas, Lithuania. [From *Eventoj* 0ct.(1), 1992.]

Scouts: Pioneer Scouts of India decided in Calcutta last year to introduce Esperanto as a required subject in the national scout program. Training courses for scout teachers began in Calcutta last September. [From UEA/esperanto 1992/11.]

International Esperanto Radio: A survey of international shortwave broadcasts in Esperanto for October last year listed 59 programs a week, totalling 25 hours and 48 minutes, from 9 stations in 8 countries (Austria, Brazil, China, Cuba, Esthonia, Italy, Poland, and the Vatican). Daily broadcasts originate from Brazil, China, and Poland. This survey does not include local radio stations reaching limited audience areas. [From UEA/*esperanto* 1992/11.]

The biggest paella in the world? At the Universal Esperanto Congress in Valencia, Spain, July 1993, a paella in a single pan for all 3000 (estimated) participants will be prepared. This will vie for a world record. (Paella is a Valencian specialty, based primarily on rice and chicken.) [From UEA/*esperanto* 1992/11.]

Stamp collectors: in the World Philatelic Exposition held in Genoa, last September, the exhibit "Chapters from the history of Esperanto" took the

gold medal. It was prepared by Vláda Vána of Czechoslovakia. [From UEA/*esperanto* 1992/11.]

China: The Commission on Professional Status of the Guangxi Autonomous Region now allows Esperanto alongside English, Japanese, and Russian for examinations undertaken by persons applying for professional status. [From *El Popola Ĉinio* 1992/12.]

Justice Kep Enderby, president of the Australian Esperanto Association, has had his photo published in the Chinese magazine *El Popola Ĉinio,* as a major participant in the 5th Pacific Esperanto Congress held in Qindao last year. Previous Pacific Esperanto Congresses were held in the USA, Canada, and Australia. The 6th will be held in Vladivostok, in the Russian Federation. (Date not yet announced.) [From *El Popola Ĉinio* 1992/12.]

New Zamenhof monument in France: On October 18, 1992, the 75th anniversary of the death of the initiator of Esperanto, L.L. Zamenhof, a monument in the city of Chambéry, France, was unveiled by mayor Louis Besson and Louis Zaleski-Zamenhof. Made of Brazilian granite, the monument is two metres high and 4½ metres long. A bronze medialon 40 cm in diameter portrays Zamenhof at age 16. The text reads "La celado de ĉiuj homoj devus esti krei harmonian homaron". ("The goal of all people should be to create a harmonious mankind.") [From *UEA/esperanto* 1992/12.]

REPORT OF THE COMMISSIONER FOR METHODS AND TOOLS OF INSTRUCTION

TO THE ESPERANTO SUMMER SCHOOL IN ADELAIDE, JANUARY 1993

BY MAX WEARING

My report falls into five parts: i) the language problem in Australia's Esperanto community; ii) the teaching of Esperanto in Australia to various age levels; iii) the 1991 and 1992 conferences of ILEI (the International League of Esperanto-Teachers); iv) audio, video, computer, and other support materials available for the teaching of Esperanto; and v) conclusions and recommendations.

i) The language problem in Australia's Esperanto community

You may be wondering why I make this my first point—well, some of you may be wondering why I am making this report at all, when AEA's *1992 Adresaro kaj Jarlibro* clearly lists Vera Payne as the "Komisiito por instruiloj" ("Commissioner for tools of instruction") and Shirley Gradussov as the "Komisiito por instrumetodoj" ("Commissioner for methods of instruction"). However, I *was* the one who was elected to and who accepted these positions at the 1992 AEA-NZEA Congress in Richmond (near Sydney), as Vera and Shirley can verify. The error in listing was made, not because of any attempt to deceive, but because we were all struggling to conduct the business of that

meeting in our *second* language, Esperanto, which all too few of us in this country have yet completely mastered *in the oral form*.

Not that this should come as any great surprise. I for one have been on the receiving end of this kind of misunderstanding from my very first AEA congress in Perth, seven years ago in 1986. There as a raw beginner I expressed frustration at finding that the beautiful, modern, streamlined language, Esperanto, unfortunately lacked the beautiful, modern, streamlined learning devices available, for example, on audio- and video-tape, that I'd found so helpful while studying French and Italian in Europe through Swiss-based Eurocentres. In those language-teaching centres, the student is totally immersed in the language he/she is learning, for every waking hour of the day and night, and can practise for hours every afternoon in a special room with a large supply of cassettes to drill him/herself into complete fluency in any linguistic structure that seems to present a difficulty. "Are there any such materials in Esperanto?" I asked.

Finding that no one had an immediate answer, the Committee commissioned me to seek the reply to my own question, giving me some useful leads about where to seek the information. You can find some such material in Jean Lehane's "lernilejo" ("exhibit of learning materials") at this summer school—unfortunately limited to what I could afford to buy overseas out of my own severely limited pocket—and to the excellent games devised by Australian Esperantists Marj Ellyard and Jean Lehane herself (plus others added in the last couple of days by Ralph Harry). One year it seemed that AEA was going to put aside $500 for buying such materials, but it turned out afterwards that this had been just one more misunderstanding brought about by the Australian Esperanto community's oral/aural language problem. In the meantime the AEA Libroservo (Book Service) has finally begun to stock some Esperanto audio-cassettes, and will perhaps soon begin to do likewise with videos.

2) Esperanto language teaching in Australia

a) The only recent example of teaching Esperanto to infants in Australia that I'm aware of is that of the Bruer family in Strathalbyn, South Australia; but I think it's a remarkable example, worthy of emulation elsewhere. By training and profession Barbara and David Bruer were chemists before they married and bought a winery and vineyard in Strathalbyn. Beginning a family as well as a new profession, they were convinced there were advantages in children becoming bilingual from earliest childhood. As their own education had not included much foreign language learning, they had no second language of their own to pass on. They considered the possibility of studying Japanese for this purpose; but soon realizing the magnitude of this task, they settled for Esperanto instead. With encouragement and support from the international network of parents bringing up their children as Esperantists (led by the Corsetti couple in Italy) and with dedicated correspondence teaching from Joyce Turner in Rockhampton, Barbara has taught herself and her two children Esperanto, practising it daily in the home. Her own Esperanto has long been good enough to make her a valuable member of the "Pasporta Servo", billet-

ing in her home even non-English-speaking Esperanto guests from several overseas countries. Her children obviously understand everything said to them in Esperanto, though (like the children of Australian migrants) they most often reply in English. Barbara's achievement has taken place in a country district 80 kms from Adelaide, the nearest town with other Esperanto speakers.

b) As far as I know there is only one class in an Australian primary school that regularly studies Esperanto (in Perth) and no secondary schools—despite the fact that more than twenty years ago, Esperanto was for a time a matriculation subject in Tasmania. The one Esperanto-course introduced into a tertiary education institution (again in Perth) no longer has any students.

c) The Introduction of the Tim Einihovici Travel Award in 1989, to send a young person overseas to represent Australia at the world international youth congress, led to the setting up of at least one university Esperanto-club (at the University of Adelaide) with regular meetings and informal classes; and at the 1990 AEA Congress, the Committee approved a list of procedures compiled by Vera Payne, Kep Enderby and Max Wearing and later accepted by Mrs Einihovici to facilitate the following of this example in other parts of Australia. It is to be hoped that this preparatory planning will soon bear results, and that the interstate committee to implement it will also begin further fundraising to increase the capital base for this and other similar awards. In 1992 two candidates presented themselves for the written section of the appropriate examination for competing for the Einihovici award, but both fell short of the minimum standard required.

d) Most of the formal teaching of Esperanto in Australia is still carried out through the AEA Correspondence Courses, at the biennial Australian Esperanto Summer School, or within the various Esperanto clubs, sometimes in association with one of several adult education organizations—to which has recently been added the University of the Third Age. There is also a twelve-lesson correspondence course devised by the British Esperanto Association that is used by some to provide beginners with an introductory overview of the language—either in the original form the course took or as updated by the BEA itself or by an American group in San Francisco. Nick Nicholas in Melbourne offers a version of this course adapted for use by members of a computer network.

e) Summing up, one would have to confess that the Esperanto community in Australia expends a much smaller percentage of its energy and other resources on the furthering of its language and culture and passing them on to the younger generation than do most other ethnic groups; and it has succeeded much less in having its language and culture taught in the country's mainstream educational institutions. The third and most important part of my report is:

3) The 1991 and 1992 conferences of ILEI

Though not a language teacher by profession, I decided to attend the annual conference of ILEI in Voss (Norway) in 1991 and in Bratislava (the capital of Slovakia) in 1992. I must report that under the chairmanship of Stephen

MacGill ILEI is rapidly getting its act together. A memorable aspect of MacGill's presentation in 1991 was a resume and reassessment of Declarations of TEJO, which in the 1970's and '80's advocated radical changes to the recruiting strategies for our language and its community. He also presented the statistics of the estimated number of speakers of various languages throughout the world (including, of course, Esperanto) as did Kep Enderby in Australia the year before. In 1992 MacGill took these themes a step further by calling to action the members of ILEI and UEA. You can read about it in the latest number of *Heroldo de Esperanto*.

"In 1993 ILEI wants to clearly put the emphasis on teacher training," he declares. "The League estimates that we need to attract about 200 000 people to courses every year in order to gain 40 000 speakers and users of Esperanto. That would demand a continuing supply of 10 000 teachers. To maintain this number we need to train about 500 new teachers every year, and that requires a kernel of teacher trainers." He goes on to enumerate the steps that ILEI proposes for 1993, and I urge you to read this article in the current issue of *Heroldo de Esperanto*. ILEI is obviously preparing itself for a vigorous campaign in the Esperanto movement generally, and we in Australia need to join it.

At the Bratislava conference I became a member of ILEI and was invited by its Committee to set up an Australian section of that League. To officially become a section of ILEI we need to have six financial members. I sincerely hope we can find them. To help this happen, ILEI was ready to support the participation of ILEI's secretary, Maria Belosevic, in this Summer School and Conference. It's unfortunate that she didn't succeed in doing so; but she has sent enrolment forms and brochures, which I'll photocopy during the week for those interested.

Meanwhile, there is a very talented young teacher of Esperanto who has expressed interest in coming to teach at the 1995 Australian Esperanto Summer School, and who is willing to do so on the same terms as Dr So is doing this year—namely to pay his own fare but to be paid at the current rate for teaching in adult education courses in Australia. He is Atiljo Orellana Rojas, 29 years of age and a teacher of languages in a university in Argentina. At present he is conducting courses in Esperanto and the teaching of Esperanto by the Cseh method in Europe, and will soon do likewise in Africa. You can read an interview with him in the latest number of the TEJO journal *Kontakto.*

4) Electronic support materials for the teaching of Esperanto

Esperanto courses on computer disk have been around for more than a decade now. During the 1991 Australian Summer School we offered a course by the American, Michael Urban, for use on a Macintosh.[1] Those who were here will remember that at the press of a key it pronounced in immaculate

[1]This HyperCard program course and another parallel to it are available from the Secretary of AEA, Ray Ross, PO Box 313, Sunnybank, Queensland 4109; please enclose a blank HD disk when requesting either of these free courses.—Ed.

synthesized speech any Esperanto word or sentence typed onto the screen. There are also Esperanto teaching programs that you can have a long conversation with. You still have to type in *your* questions and comments, but the computer replies in its own voice, and (if you ask it to) it will give you a printout of what it is saying.

The most remarkable language teaching programs I have seen so far is the series written by Hungarian computer-linguist, Dr Ilona Koutny, who is head of the post-graduate courses in the ELTE University in Budapest. With the use of *ESPEROL*, a piece of hardware useable with IBM compatible computers, and the software which goes with it, you can practise your Hungarian, French, Italian, German, Finnish or Esperanto by conversing with the computer. When I was in Europe last year the equipment and disks for the Esperanto courses were selling at about SF700—at that time about AUD$700.

Last year at the end of the AEA-NZEA Congress in Sydney, you may have had the good fortune to meet Per Edler, from Sweden, who is developing computer courses based on the same principles for primary school students learning English, Swedish, German and Esperanto. It would be nice to see *ESPEROL* and the programs of Edler (and anything similar that is produced in the meantime) at the next Language EXPO, which will be held in Sydney in July, 1994.

It would also be nice to see at the Sydney Language EXPO samples of videos in Esperanto and hear cassettes from its popular music industry. These were well received at the Esperanto stand in the conference of principals of Australian private schools a couple of years ago in the Hobart casino building.

While on the subject of audio cassettes, I must mention that the two best programmed courses that I have found for allowing students to drill in private the various linguistic structures needed for everyday conversation are the one Dr Behrmann made in 1973 (Vera Payne gave me a copy of the texts after my first talk in the 1986 Perth AEA Congress) and the one Andreo Pettyn made, I presume, in much the same era. Unfortunately the quality of the tape that the Pettyn course has been done on is nothing short of abominable, and our book seller Tom Elliott refuses to stock it; and in the meantime Mr Pettyn goes on selling the course, refusing to acknowledge the low technical quality of the tapes. This is a great pity, because their contents would be very useful indeed for a lot of learners in a place like Australia, where there is a shortage of regular classes and opportunities for new learners to hear and practise the spoken language.

5) Conclusions and recommendations

Relating my outline of contemporary developments in Esperanto language teaching methods and technology with our basic language problem in Australia, I would make the following recommendations:

1) That both the biennial Australian Summer School and the biennial Australian Esperanto Association Congress become annual, eventually taking place in different Australian cities and at different times of the year, with increasing encouragement for participation by overseas teachers and students;

2) That we encourage more of our members, including new ones, to travel to Esperanto events overseas, spreading news about ways that this can be done economically;

3) That in the next twelve months we do away with the titles of "Komisiito por Instruiloj" and "Komisiito por Instrumetodoj" and replace them by a national Australian League of Esperanto Teachers (with at least one member from each major region), which would become a section of ILEI, the International League of Esperanto Teachers;

4) That this proposed Australian League of Esperanto Teachers meet regularly at the Annual Congresses and Summer Schools and keep in communication in between these events, and report to meetings of the Committee and/or General Meetings of AEA, setting up as soon as possible a section of ILEI.

If these recommendations are adopted, I would myself volunteer to convene and coordinate this proposed ALEI. I suggest that it draw up a five year plan with ambitious but realistic targets, and work on increasing the number of teachers for teaching Esperanto as a language in the home right from birth, of Esperanto classes in schools, of university clubs, and of purchases and construction of teaching aids. I suggest that it take up the tasks of the Tim Einihovici Travel Award committee whose activities seem to have now lapsed, and work towards the revival of JAGE and JAGE's eventual affiliation with TEJO. While I am sympathetic to the group that calls itself *Novuloj*, and am even a paid-up member of it, I think it would be unfortunate if Novuloj were seen as a replacement for JAGE. It seems to me highly desirable to have an organization of Australian Esperantists made up entirely of young people within the age limits set down by TEJO. People beyond that age group wanting to promote and support Esperanto among the under thirties might usefully set up an organization of Patrons of JAGE in the same way that UEA and TEJO have set up the organization Patrons of TEJO, charging themselves an annual fee of something like three times that of JAGE members. A substantial part of the money thus collected could be directed into the capital of the Einihovici Foundation and similar funds, providing substantial incentives for young people to learn our language to a high level of proficiency.

I could go on making up suggestions of this sort. Whether or not they came to anything would depend on whether they found favour with a significant number of others who really care about the recruitment and teaching of new Esperantists, and who would be prepared to get together and really do something about it. My main recommendation is that we set up a league of such people and get on with the jobs that need to be done for building up and maintaining **a real Esperanto community** in Australia. If we don't, we have no right to become indignant when politicians or journalists or others write Esperanto off as merely a hobbyists' language unworthy of serious consideration.

Max Wearing may be contacted at 30 Westbury Street, Hackney SA 5069, Australia.

Our Correspondence Courses

by John Moore

4. Course 4—Step by Step

Having worked through Course 3, perhaps already enjoying books and magazines in Esperanto and writing to overseas friends (as with the Scouts, no Esperantist is a "foreigner" to another!) many of us would like to progress further, to learn some points better—and we may feel the need for a handy reference book, to more easily find forgotten details.

These needs are filled by our fourth course, the **Progressive** which uses selected paragraphs from M.C. Butler's *Step by Step in Esperanto* (one of the best books yet written for English speaking Esperantists) to clarify just those points which give most trouble to most of us.

Course 4 also brings to notice many "false friends"—words which look or sound similar to well-known English words, but which do **not** have exactly the same meanings. There are some hundreds of these, and enough are explained in the course to instil the good habit of consulting the dictionary for even the most familiar-sounding words, much more often than we do.

For examination candidates, Course 4 is calculated to bring us from **Elementa** up to the **Supera** examination level.

Quite apart from the prescribed paragraphs, *Step by Step in Esperanto* contains as they say on TV "much, much more". Many little songs, jokes, puns ("Li estas **intima** amiko." "Sed kial li timas la inojn?") and poems—some witty, some beautiful, some both—are sprinkled through its 280 pages, among the clear grammatical explanations and useful exercises. But perhaps the most useful feature of *Step by Step in Esperanto* is its comprehensive, easy-to-use **Index**. Once the habit of using the **Index** has been acquired (and the tutor will help with this) one can find the desired detail of almost any point of Esperanto grammar, in minutes. Long after the course has ended, *Step by Step in Esperanto* remains a reliable consultant and friend.

The Wells *Teach Yourself* Dictionary which came with Course 3 can be used also with Course 4. Even better, if desired, are the *English-Esperanto Dictionary* of Fulcher and Long, and Mr Butler's own *Esperanto-English Dictionary,* both available from our Libroservo.

John Moore is Director of Correspondence Courses for the Australian Esperanto Association. He can be contacted at 7 Pelican Street, Emu Park Qld 4702.

tendumis."..."Ĉu li vere atendas ke la rivero tiom altiĝos?" Certe la nivelo de la rivero ŝajnis minacanta. Do, ree ni translokiĝis al pli alta tero.

La sekvantan tagon, du tagojn post la ŝtormo, la rivero plejaltiĝis. La akvonivelo estis pli ol ses metrojn super la kutima fluejo. Ni miris dum ni vidis la tumulteman malklaran akvon rapide forfluantan.

Mi ne planis resti tiom longe en Gregori. Tial mia mono preskaŭ elĉerpiĝis. Ne ekzistas banko aŭ eĉ poŝtoficejo tie por elpreni monon, do mi zorge elspezis la ceteron. Kvankam mi ne menciis mian situacion al Ŝaŭn, tamen li iel divenis tion. Kiam li pretigis siajn manĝojn li ĉiam diris "Ho, mi kuiris tro da manĝo. Se vi ne dezirus ion, mi devus forĵeti la troaĵon." Tiel mi ne devis peti helpon de aliaj. Ankaŭ li donis al mi kopion de sia libro. Kvankam Ŝaŭn iom tro drinkis, bedaŭrinde foje preskaŭ ĝis manko de marŝkapablo, tamen al mi li estis vera amiko kaj senfanfarona helpemulo. Mi neniam forgesos ĉi tiun homon kaj la okazaĵojn apud la Gregori-Rivero. ❑

LA OK-BOVINA EDZINO

DE MARGARET FURNESS

Mi ofte aŭdis pri Joĉjo, la saĝa junulo, antaŭ ol unuafoje renkonti lin. Li estis la plej lerta ĉasisto de sia insulo, kiu troviĝis ie en la Pacifika Oceano. Simile, li estis tiom zorgema kultivisto, kiu sciis ne tro ekspluati, ke li jam iĝis la plej riĉa junulo de la vilaĝo. Se turisto deziris trovi bonan lokon por fiŝkapti, aŭ serĉis gvidanton por piedesplorado, la respondo ĉiam estis: "Demandu al Joĉjo". Sendube li iĝos registarano pro sia insulo.

Sed kiam mi menciis Joĉjon en apuda insulo, ĉiuj ekridegis.

"Joĉjo! Tiu stultulo! La 'saĝa junulo' finfine freneziĝis! Ĉu vi aŭdis, ke li proponis ok bovinojn por la filino de Marko? Lia bopatro estas ruza vendisto, ĉu ne?"

Ankaŭ ni miregis, ĉar ni sciis, ke la kutima edzinprezo en tiu regiono estis du bovinoj. Malofte, por belega junulino, ŝia patro postulis tri bovinojn; kaj kiom fiere la belulino ridetis al siaj amikinoj! Sed virino, kiu valoris je nur unu bovino, promenis humile en la bazaro, kaj la najbarinoj neniam forgesus tiun prezon. Ni ne parolu pri la honto de junulino kies fianĉo volis pagi por ŝi nur porkon, aŭ eĉ nenion...

Ni demandis: "Ĉu la filino de Marko estas tiel belega, do?"

"Ne, ne! Ŝi ne estas malbela, komprenu, sed tiel timema, tiel sin-kaŝema, ke neniu rimarkis ŝin. Ŝia patro komencis timi, ke li devus pagi al iu, por forpreni ŝin, kaj ŝi preskaŭ ne kuraĝis levi la okulojn kiam ŝi iris tra la vilaĝo. Kaj Joĉjo pagis ok bovinojn por ŝi! Kia fuŝmarĉandisto!" Kaj refoje ili ridegis.

Aliajn surprizojn ni trovis. Kiam ni atingis la insulon de Joĉjo, kaj demandis pri li, neniu mokridis. Oni parolis pri li respekteme, kiel antaŭe. Ni vizitis Joĉjon, kaj li invitis nin eniri sian domon. Kiam la nova edzino enportis trinkaĵon, ni rigardis ŝin flanke. Refoje ni miris. Belega ŝi ne estis, sed tion ni ne tre rimarkis: nur ke ŝi moviĝis tiel gracie, kiel reĝino, kaj ke

ŝia dolĉa rideto al Joĉjo ŝajnis brili.

Post la fino de niaj negocoj kun Joĉjo, mia amiko ne plu kapablis ne demandi:

"Joĉjo...en la hejmvilaĝo de via edzino, oni ŝajnis iom surprizita pro ŝia edzinprezo."

Joĉjo ridetis milde. "Nu, mi deziris ok-bovinan edzinon", diris la saĝa junulo.

(Mi aŭdis tiun rakonton per radio antaŭ kelkaj jaroj. La traduko estas laŭ mia memoro de ĝi. La originala versio, de Kathryn Edwards, estas pli longa.) ❑

POCKET ESPERANTO DICTIONARY

RECENZAS RALPH HARRY

POCKET ESPERANTO DICTIONARY: English-Esperanto, Esperanto-English: Over 50,000 words and phrases. Dr Andrew McLinen. Lingua Publications (Pollando). Ankoraŭ ne havebla ĉe la Libro-Servo de AEA/NZEA.

La subita apero en la Somerlernejo en Adelajdo de nova angla-esperanta—esperanta-angla vortaro surprizis multajn, inkluzive min. Mi sciis, ke Peter J. Benson de Maryland, Usono, preparas *Comprehensive English-Esperanto Dictionary,* ĉar li konsultis min kaj la redaktoron de *Australian Esperantist* pri aŭstraliaj terminoj. Sed D-ro Andrew McLinen ne informis nin pri sia projekto. Je la peto de la Estrarano pri lerniloj mi dediĉis kelkajn horojn al la preparo de tuja recenzo.

La celoj de la aŭtoro

La antaŭparolo diras malmulton pri la origino aŭ la celo de la verko...nur ke ĝi celas esti ampleksa, ke ĝi estas en strikte "alphabethical [tiel!] order" kaj ke la tildo estas uzata por anstataŭi la ĉefvorton por fari la vortaron portebla. Kovrile, dorsflanke, oni pretendas, ke la vortaro estas "authoritative" sed ne klarigas la fonton de la aŭtoritato. La vortaro mem tute ne indikas ĉu radiko estas fundamenta aŭ oficialigita de la Akademio de Esperanto aŭ uzita de Zamenhof aŭ alia fidinda aŭtoro. Oni devas fidi al D-ro McLinen, kies antaŭajn verkojn mi ne konas.

La enkonduko donas nur prononctabelon, la 16 regulojn kaj mallongigojn. Mankas multe da informoj, kiujn enhavas *Esperanto-English Dictionary* de J.C. Wells.

Amplekso kaj akceptebleco

Mi rapide kontrolis kelkajn fakojn, pri kiuj mi lertis aŭ spertis, por taksi la amplekson kaj akcepteblecon de la vortaro.

Certe ĝi inkludas multajn teknikajn vortojn de la fako **komunukiloj**, kiuj ne troviĝas en la vortaro de Wells. Ekzemple:

byte (COMPU) bajto; **kilo/mega~** kilo/mega bajto

fax v telefaksi, sendi per telefakso n telefakso

fax machine telefaksilo

computer language maŝinlingvo

data (COMPU) dateno

sed estas kelkaj dubindaĵoj, ekzemple

floppy disk (COMPU) disketo, malmola [tiel!] disko

kaj mankas kelkaj necesaj vortoj, ekzemple **modem, software.**

Rilate medicinajn terminojn kaj problemojn troviĝas:

AIDS aidoso
bloodbank banko de la sango
in vitro en vitro
Parkinson's disease tremiga paralizo
sed mankas
gay geja
HIV = Homa Imunmanka Viruso
sperm bank banko de la spermo
Alzheimer's disease

Verkanto aŭ leganto pri la tre aktuala temo **ekologio** ne trovus tre klaran gvidadon en *PED*. Por "**greenhouse effect**" li devus elekti inter plantodomo, varmdomo, varmejo kaj (se li konas la anglan vorton "**orangery**") oranĝerio. "Forcejo" estus mistero, kvankam en PIV ja estas **forc/i** (tr). Kultivi subvitre plantojn, donante al ili la plej bonajn kondiĉojn, por ke ili plej rapide kresku. **~ejo** Vitra domo, kie oni ~as plantojn. Ĉe **pollute** troviĝas nur malpurigi. **Genetic engineering** ja estas tradukita, sed iom malspecife: genetika tekniko.

En la fako *kuirarto* **doughnut** estas "dolĉa pastobulo" (ne -ringo). Kompreneble ne troviĝas **damper, lamington, Melba sauce, Melba toast, pavlova, Pêche Melba, aŭ pikelet. Scone** estas tradukita per platpano, kaj **petit four** (malgranda sukerajĵita kukkubo) per biskviteto (laŭ la modelo de Wells). Troviĝas **cheesecake** fromaĝkuko, **goulash** gulaŝo, **ragout** raguo, kaj **stew** stufaĵo kaj **vol-au-vent** volovano. Estas iu preseraro rilate **yoghurt** kiu aperas alfabete post **yogi** sed en la formo **hoghurt, hoghourt!**

Rilate **kartludojn** ja troviĝas la nomoj de la bildkartoj—**aso, reĝo, damo** (kvankam Claude Piron en *La Bona Lingvo* uzas **reĝino!**) kaj **bubo, fanto**. Estas la emblemoj **piko, kero, karoo, trefo.** Mi ĝojis trovi **briĝo, atuto, fantomo** kaj **ŝlemo.** Sed la traduko de **finesse** (riskometo) ne tre kontentigas. La teknika termino "fineso" jam troviĝas en *PIV*. La aŭtoro ne sekvas la uzadon de spertuloj rilate "trick" (**treko**) kaj preferas la zamenhofan sed ne specifan "prenon". La distingo inter "anonco" kaj "oferto" (**bid**) ne estas respegulita. Kompreneble multaj fakaj vortoj kiaj **singleton, Yarborough, renege** mankas, kvankam **revoke** missekvi (same kiel Wells) ja havas lokon. **Poker** pokero kaj **backgammon** triktrako sed nek **cribbage** kribaĝo nek **nap** troviĝas.

Sur la kampo de **sportoj** la nomoj estas konservative fundamentaj: piedpilko, futbalo, rugbeo, korbopilko, bazopilko, retpilka ludo (**volleyball**), volanludo (**Badminton**) molpilka rakedludo (**squash**), kriketo. Rilate golfludon *PED* distingas inter golfbastono kaj golfa klubo. Sed estas malfacile kompreni ĉu bunkro estas la golfa termino. **Fairway** estas bona irvojo. **putt** tradukiĝas v ruli n rulo, sed **putting** estas etgolfludo. **tee** estas bone tradukita (v surkonusigi n drajvkonuso) sed ne troviĝas traduko de **tee** (loko) aŭ **rough** aŭ nomoj de klaboj kiaj **wedge, driver.**

Kiel Esperantisto "sub la Suda Kruco" mi studis antaŭnelonge la nomojn de la konstelacioj de la zodiako. Kvankam en la fruaj tagoj estis diversaj tradukoj de la serio Aries, Taurus, Gemini, Cancer, Leo ktp, la listo de *PIV* estas sekvata de multaj Esperantistoj. *Esperanta Bildvortaro* identas. *La Gazeto de Metz*, kiu havas astrologan rubrikon, varias nur rilate Aquarius, kiun ĝi tradukas per "Akvisto" (*PIV* Amforo). Nun *PED* reiras al la listo de Wells, sed ne entute. **Gemini** fariĝis **Geminal** (!), Leono fariĝis "la Leono" kaj "Fiŝoj" fariĝis "la Fiŝoj". Estas dezirinde, ke oni sekvu la liston de *PIV*, kaj ke

oni ne uzu artikolojn por la ĉefvortoj.

Rilate **nomojn de landoj** D-ro McLinen ofte donas nur la adjektivon, eĉ kiam la nomo estas fundamenta aŭ oficialigita de la Akademio. Tiel troviĝas ne **Australia** sed **Australian** adj aŭstralia n aŭstraliano, ne **Egypt** sed **Egyptian** adj egipta n egipto (kiu estas la nomo de la lando laŭ la rekomendo de la Akademio). Same troviĝas nur **Korean** adj korea n koreano, kaj **Ukrainian** adj ukrajna n ukrajnano. Tamen ja troviĝas **Guinea** Gvineo, **New Guinea** Nov-Gvineo kaj **New Zealand** Nov-Zelando. Preserare aperas **Nex** (!) **South Wales** Nova Sudvaleso (kvankam **Wales** estas Kimrujo). Spite al la rekomendo de la Akademio *PED* donas por **Afghanistan** Afganlando, kaj por **Kurdistan** Kurdlando. **Pakistan** ne aperas, sed troviĝas **Pakistani** adj pakistana n pakistanano! **Queensland** estas Kvinslando. **Victoria**, la ŝtato estas tradukita Viktorio adj viktoriana (!) n viktoriano. **Tasmania**, **South Australia**, kaj **Western Australia** mankas.

Canberra aperas (Kanbero) kiel la federacia ĉefurbo, sed Sidnejo kaj Melburno tute ne. **Washington** estas transliterita Waŝingtono!!! **Wellington** la ĉefurbo de Nov-Zelando ne aperas, eĉ kiel Velingtono (*PIV*). Nov-zelandanoj serĉus vane Uelingtono! Multaj ĉefurboj mankas, ekzemple Buenos Ajreso, Rio de Ĵanejro, Santiago, Seulo.

Rilate **Aŭstralion** *PED* enhavas la kutimajn aborigenajn vortojn, ekzemple **bumerango, emuo, kanguruo, koalo, valabio, vombato.** Por **lyrebird** estas bone proponata lirvostulo, menuro. Aliaj estas dubindaj: **billycan** gamelo, **dingo** dingohundo, **anteater**, formikomanĝanto, **magpie** pigo, **wattle** aŭstralia akacia, **squatter** uzurpanto. **Budgerigar** preserare aperas **brudgerigar** (!) papageto. Mankas tradukoj de **aborigine, billabong, corroboree, didgeridoo, echidna, goanna, kookaburra, rosella, woomera** ktp ktp.

Multaj **juraj terminoj** estas donitaj, sed kelkfoje alternative, sen indiko de la nuancoj, ekzemple **mediate** peri, interhelpi, pacigi. Same kiel Wells, McLinen inkludis kelkajn jurajn terminojn el la latina, ekzemple **ad hoc**, **ad lib**. Sed aliaj egale "anglaj" esprimoj, ekzemple **de facto, nisi, sine die**, mankas.

Sur la kampo **diplomatio** troviĝas **aide mémoire** memorhelpilo, memorlibro (=noto), **credentials** akreditaĵo, **diplomatic corps** diplomataro, **détente** malstreĉiĝo, **legation** legacio, **chargé d'affaires** aferŝarĝito **embassy** embasado, ambasadorejo. Ĉe **protocol** estas sugestata "ceremoniaro, protokolo", sed ĉe protokolo troviĝas **minutes** kaj mankas la senco "aldono al traktato". **NATO** estas Nord-Atlantika Traktata Organizacio sed **ILO** estas Internacia Laborорganizo. (Por **organization** estas proponata 1 organizo 2 organizado 3 organizaĵo—organizacio ne aperas.)

Pro mia verkado pri la internacia juro de la maro interesis min trovi 40 kunmetitajn esprimojn uzantajn "sea" (ĉe Wells troviĝas nur 20). Plejparte ili estas bontrovitaj, ekzemple **high seas** alta maro, plena maro. Sed mi ne komprenas **seadog** alta maristo kaj **sea mile** marmajlo (!) supozeble estas preseraro.

Kiel disĉiplo de Piron mi ĝojis ne trovi la francan novradikon (neologismon) "merd", sed jen estas **monotonous** monotona (ne unutona). Ankaŭ ĝojigis min **languor** malviglo ĝis mi trovis en la esperanta-angla parto **langvoro** languor! Trompis miajn esperojn (*PED* havas interesajn propon-

ojn por **disappoint** kaj **share**) ne trovi la prefikson "stif-" proponitan de M.C. Butler, ĉar estas distingo inter duonfrato kaj stiffrato, kaj stifpatrino ja ne estas duonpatrino.

Mi ne detale kontrolis la slangajn vortojn, sed hazarde mi rimarkis kelkajn novajn, ekzemple **bullshit** (interj stultaĵoj) kaj **walkie-lookie** (portebla kamero). Kompreneble mankas multaj aŭstraliaj slangaj esprimoj, ekzemple **Aussie** kaj **Pommy.**

Mia **provizoraj konkludoj** el hasta kaj supraĵa kontrolado estas ke

(1) *PED* ja estas pli ampleksa ol iu ajn antaŭa angla-esperanta vortaro, sed ke ankoraŭ mankas kelkaj necesaj terminoj pri diplomatio, ekologio, juro, kartludoj, kuirarto kaj sporto, kaj pri Aŭstralio.

(2) Estas tro da preseraroj, nekonsekvencaĵoj, kaj dubindaj tradukoj

(3) *PED* povus esti utila por rapida akiro de sugestitaj tradukoj sed se oni dezirus esti certa, ke traduko proponita de *PED* estas fidinda, oni devus posedi ankaŭ la vortarojn de Butler kaj Wells, *PIV*, kaj *Esperantan Bildvortaron.* Tiujn oni ne povas porti en sia poŝo.

Mi rekomendas, ke AEA, NZEA kaj ĉiu lando kies lingvo estas speco de la angla, kiel eble plej baldaŭ starigu komitaton por kontroli *PED* kaj fari sugestojn al D-ro McLinen kaj al Lingua Publications cele la preparon de dua korektita eldono. Kaj subtenate de miaj samklasanoj en la Somerlernejo, mi opinias, ke estus utile por ni havi la 4-an eldonon de Aŭstralia-Esperanta Vortaro, tiel baldaŭ kiel Donald Broadribb povas dediĉi al tiu projekto la bezonatan tempon. ❑

RECENZETOJ

Dan Maxwell: ***Perkomputila tradukado: La revo kaj la realo.*** Esperanto-Dokumento 30E. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio 1992. 20p. Broŝurita. Unuopaj ekzempleroj: Gld 9.80 (inkl. poŝtkoston) de UEA. Abono al 10 sinsekvaj dokumentoj: 46 gld.— Ĝenerale, pliampleksigita formo de la verketo "Multilingual machine translation" aperinta en *Esperantic Studies* (*TAE* Nov-Dec 1992). Inkludas skizetojn de 10 diversaj nuntempe komerce haveblaj sistemoj por perkomputila tradukado. DB

Marija P. Angelova: ***kien ni iras.*** Biblioteko "Survoje", Sofio, 1991. 32 paĝetoj, broŝurita. Adreso de la aŭtoro: M P Angelova, Bl. 526-G-27, Sofia 1229, Bulgario. Prezo ne indikita. 28 poemoj; el ili la titolpoemo:

Dum tiuj tagoj
streĉaj, nebulaj
kien ni iras?
Ĉu emocioj
venkos la pensojn
kaj ni ne povos
sobre pripensi
la ĝustajn paŝojn
al la estonto?
Bolas animoj...
Kvazaŭ el kaĝoj
ekflugis ĉiuj...
Kien ni iras?
Ni kredu firme,
ke baldaŭ regu →

nur saĝo vera,
profundaj scioj. DB

Yuan Ke: ***Ĉinaj Mitoj.*** Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1992. 95p. broŝurita. AUD$2.70, de la Libroservo. Laŭ la aŭtoro, nur fragmentoj de antikvaj ĉinaj mitoj troveblas. Li tamen kompilis kaj reverkis por la aktuala leganto 20 nelongajn mitrakontojn. Interesa legaĵo. Multaj ilustraĵoj laŭ "primitiva" stilo. DB

Ŝer Reĉi [Sher Ritchie]: ***La Nekoruptebla Patrioto kaj Administristino (la revo de Civitano Montaigne)/Songanta Blake (La vizio, kiun Vilhelmo Blake forgesis).*** Privata eldono, 1993. 98p. broŝurita. Prezo: AUD$3 (inkl. poŝtkoston), mendebla de Ŝer Riĉi, 59 Yurongi Street, Caravonica Qld 4878. Vidu anoncon sur p. 25 de ĉi tiu numero.—Ĉi tiu libreto, la unua Esperanto-verkaĵo de Sher, certe estas pens-instiga kaj estas bele ilustrita per taŭgaj vinjetoj. Parte historia kaj parte ne, la enhavo estas interesa miksaĵo, kaj valoras legadon. Kiel ofte okazas al novaj lingvistaj aŭtoroj, gramatikaj kaj presaj eraroj ofte enŝteliĝas en la tekston, kiuj bedaŭrinde interrompas la tujan komprenadon de la koncern-aj frazoj; malgraŭ tiaj eraroj, mi gratulas al la aŭtorino pri la verketo kaj rekomendas aĉeton.—Ray Ross.

Armand Su: ***Poemoj de Armand Su.*** Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1992. 158p. broŝurita. AUD$3.60, de la Libroservo. Kolekto de 178 originalaj Esperanto-poemoj de la Ĉino Armand Su (1936-1990).—Se mi ne eraras, la unua siaspeca el Ĉinio. Specimena poemo:

Bela edzino lin akompanis ĝis la pordo,
kaj tiris lian kravaton ankoraŭ en ordo.
Li kisis ŝin kaj ŝian hararon karesis,
kaj plej frue kiel eble reveni promesis.
Mi scias, kian belan nokton ili trapasis,
kaj kian ekstaz-impreson li al ŝi lasis.
Sed ili ne scias, ke lastanokte ĉe l' kuseno
mi longe ploris pro soleco kaj korĉagreno. DB

Pierre Janton: ***Esperanto: Language, Literature and Movement.*** Tradukis kaj redaktis Humphrey Tonkin, Jane Edwards kaj Karen Johnson-Weiner. Albany (NY, Usono): State University of New York Press, 1993. 169p. Usona prezo: broŝurita, US$14.95; bindita US$44.50.—Tre grava libro, ĵus ricevita. Ankoraŭ ne havebla ĉe la Libroservo. Recenzo aperos en venonta numero. DB


Ankoraŭ detale recenzotaj

Su Kaiming: ***Moderna Historio de Ĉinio laŭ Temoj.*** 1992. 210p. (Rec. Ralph Harry).

Bakin: ***Frosta Nokto.*** 1990. 301p. (Rec. Donald Broadribb).

Rudolf Rakuša: ***Metodiko de la Esperanto-Instruado.*** (Represo 1991) 189p. (Rec. René Smeets).

Edward Symoens: ***Al nova internacia lingvopolitiko: la propedeŭtika valoro de Esperanto.*** UEA: Esperanto-Dokumento 28-29E. 44p. (Max Wearing).



LINGVA ANGULO

de ALAN TOWSEY

ENUI, TEDI

The difference between these two roots is subtle, and has eventually to be *felt.* The best way to do this is to compare the definitions given below, then study the numerous examples in *PIV.* However, not everyone has access to a *PIV,* so Ralph Harry has selected a number of appropriate examples, which follow the definitions. Sometimes, you will note, the meanings seem to overlap slightly, and you may have to give long and careful thought to the choice of the most appropriate word, according to the circumstances.

Basically, **enui** is intransitive, i.e. does not take an object. It is passive in force—a feeling of boredom grows on one because of inactivity or lack of interest. **Tedi** is mainly transitive, i.e. it takes an object, expressed or understood. It is active in force—someone or something annoys, pesters, bothers you by its unwelcome presence or attentions, constant repetition, going on too long etc.

The various derivatives (enuo, enuiga, enuigi, tedo, teda etc.) reflect the basic meanings of their roots.

In the first edition of the *Universala Vortaro* of Dr Zamenhof, definitions of all words were given in French, English, German, Russian and Polish (Zamenhof's own mother tongue). It is instructive to see, therefore, what these words meant to the author of Esperanto himself—the man who invented them. Unfortunately, Zamenhof's knowledge of the other languages was not perfect, as you can see, and the Lingva Komitato decided, at the 2nd Universala Kongreso in Geneva in 1906, that a revised version was necessary. The work continued until 1914, but because of the War was not published in full till 1922-3, although various parts of it had been published beforehand.

The following abbreviations are used below: **UV** *Universala Vortaro*; **PIV** *Plena Ilustrita Vortaro*; **GM** Grosjean-Maupin *Esperanto-French Dictionary*; **D** Middelkoop *Esperanto-Dutch Dictionary*; **W** Wells' *Esperanto Dictionary*; **B** Butler's *Esperanto-English Dictionary*; **M** Millidge's *Esperanto-English Dictionary.*

ENUI

UV (Original edition): s'ennuyer [be bored] | annoy, weary | sich langweilen [to be (get) bored] | скучать [to be weary, tired, feel dull, grow tired, to have a tedious time] | nudzić się [feel bored, dull, be weary].
(Corrected edition): — | be bored, weary | — | — | — |

PIV: (ntr) malplezuri pro senintereso aŭ neokupiteco. (**enuo:** malagrabla impreso de seninteresiĝo).

GM: s'ennuyer [be bored]

D: zich vervelen [be (feel) bored].

W: feel dull, be bored, be fed up.

B: be bored, fed up, feel (find it) dull, find time drag, lose interest, mope, not

to know what to do with oneself. (**enuo:** mental weariness from lack of occupation or interest, boredom, ennui, languor, lassitude, listlessness, tedium).
M: to feel weary of, lose interest in, get bored, feel (find it) dull, mope, not to know what to do with oneself. (**enuo:** tedium, boredom, ennui, languor of mind, listlessness).

EXAMPLES

Mi enuis la tutan tagon atendante vin. Kun tia rakonto oni eĉ ne unu minuton enuas. Ĉu vi neniam enuas en tiu soleca vivado? La vera mondumo estas tiu, en kiu oni enuadas. Laboro estas plej bona kuracilo kontraŭ enuo. Kiu amas ĝuon, amu ankaŭ enuon.
enua: Rilata al enuo. enua mieno. Scienco havas semon enuan sed frukton bonĝuan.[z] Kiel enue estis en tiu salono. **enuiga:** kaŭzanta enuon. enuiga romano, dramo. Ŝi tute ne amis la enuigan talpon. monotona terure enuiga (teda) laborado. enuiga homo, laboro, libro, sono. **enuigi:** kaŭzi enuon (maldistri, malamuzi). La konstanta elokventeco enuigas (tedas). La komedio estis tiel sensprita, ke ĝi enuigis ĉiujn. Tiu sencela vagado baldaŭ lacigas kaj enuigas. Malfacila kaj enuiga (teda) laborado.

TEDI

UV (Original edition): provoquer la satiété, ennuyer [provoke satiety; bore, weary, bother, put out, annoy, get on one's nerves] | tedious | Ueberdruss erregen [arouse surfeit, satiety] | надоѣдать [to weary, tire, annoy] | dokuczać [tease, annoy, pester].
(Corrected edition): provoquer la satiété, importuner [importune, trouble, bother], obséder [haunt, obsess, pester] | bore, weary, annoy | lästig sein [be tiresome, irksome, annoying, aggravating, to bother, be a nuisance to], Überdruss erregen | — | naprzykrzać [molest, importune, pester, intrude upon].
PIV: (tr) ĝeni per neoportuna alesto aŭ insisto. (ntr) malagrable impresi per troa daŭro aŭ ripetiĝo. (**tedo**: sento de iu, kiun oni tedas).
GM: ennuyer, fatiguer [weary, tire, put a strain on, annoy], dégoûter [disgust, revolt, make weary of, put someone off], lasser [weary, tire], importuner [importune, bother, trouble].
D: vervelen [bore, annoy], vermoeien [tire, weary, fatigue], tegenstaan [revolt, be repugnant to, strongly dislike ('t eten/hij staat mij tegen), pall on].
W: bore, tire.
B: bore, weary, fatigue (tire) by excessive length, importunity, repetition etc. (**tedo:** boredom, tedium [caused by another])
M: to weary, be wearisome to, bother, bore, tire, make sick of. (**tedo:** tedium, ennui, boredom [caused])

EXAMPLES

Mi ne kuraĝas plu tedi vin per mia alestado.[z] Permesu, sinjoro, mi ne longe tedos vin. Detenu vian piedon de la domo de via proksimulo, ĉar alie vi tedus lin. Ĉu mi nenion plu sciiĝos?—Vi tedas min terure, respondis la virino.[z] Ŝi ĉesu tedi al ili la kapon. Al kelkaj la veturo tedis.[z] Tedis al ŝi sidi hejme. La granda

ovo ĉiam ankoraŭ tie kuŝas: nun tio baldaŭ tedos al mi (ĝin kovi)![z] Jam tedis al mi ĉiam aŭdi nur pri cignoj. La senĉesaj pluvoj tedis la vojaĝantojn. Esti tedita de io. En juneco logas, en maljuneco tedas. Ha, tedis tia vivo![z] Tian tedon mi ne povas pli longe toleri. Malpli da posedo, malpli da tedo.[z] Kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo.[z] Ha kia tedo! Se ni senĉese ĝis tedo frapadas sur la orelojn de la publiko.[z] **teda:** tia ke oni estas tedata (tedas). Amiko fariĝas teda, se li tro longe sidas en la domo.[z] Kia teda parolado! Naskiĝas teda sento de fremda korpo, kvazaŭ en la okulo estus polvero.[z] Li estas teda kiel kulo/kiel pulbuŝelo. Dum du tedaj horoj li rakontis pri sia malsano. **tedadi:** tre longe aŭ ofte tedi. Ŝi tedadis lin per siaj vortoj ĉiutage. **tediĝi:** fariĝi tedita. Mia animo tediĝis de ŝi. **tedulo:** homo, kiu tedas (a bore).

Note also: **malenuigi** (amuse, entertain—cf. distri, amuzi). **enuigita** (bored, wearied). **vivenuo** (weariness of life, satiety). *PIV* **spleno:** malsana stato de la animo karakterizata per konstanta enuo kaj indiferenteco al ĉio.—cf. melankolio, hipokondrio.

My thanks to Ralph Harry for his exhaustive research! ❑

Ĝenerala Kunveno de AEA en Adelajdo

La kunveno aprobis la proponon ke la AEA-kotizoj estu: Por membro, $30; Membro/familio, $35; Koncesia, $20; Asocio-Membro $10.

La kunveno akceptis la jenan rezolucion: Rezolucio de la jarkunveno, 1993, de AEA, ke oni informu UEAn ke AEA bonvenigos la okazon de la 1997a Universala Kongreso en Adelajdo, Aŭstralio, kaj invitas UEAn intertrakti ĉi-rilate.

Internacia jaro de Indiĝenaj Popoloj: Ralph Harry proponis "ke estu kolekto de legendoj kaj kantoj; ke oni informu organizaĵojn de Aŭstraliaj Indiĝenoj pri intereso de Esperantistoj pri la indiĝenaj popoloj; oni eldonu antologion de legendoj kaj kantoj".


La kunveno akceptis proponon de Ralph Harry ke "la estraro starigu koncizajn gvidregulojn pri starigo de kongresoj, ĉefe por gvidi tiujn kiuj organizas: (a) seminariojn, (b) kunvenojn de gazetaro, (c) profitcelojn kaj distribuon".

Jarkongreso kaj Somerlernejo de AEA: Max Wearing proponis kaj la kunveno subtenis ke: "Kongreso kaj Somerlernejo okazu ĉiun jaron: la 1994aj Kongreso kaj Somerlernejo kunokazu en Adelajdo en januaro 1994".

Elekto de Estraro 1993: laŭ propono de Ralph Harry, la estraro 1992 estis reelektita por 1993. Unuanime akceptita. ❑







DIVERSAĴOJ



- ***Ĉina sola esperantisto, mezaĝa, volonte regalas*** ĉiun kiu parolas esperante, el ĉiu angulo de la mondo. Senpage loĝi kaj manĝi estas eble ĉe li. Antaŭkontaktu ✉ Mo Zhixiong, Mei-gui-yuan-xi-cun 73 hao, 4-3#, Han-Yang-Qu, Wuhan, CN-430051 Ĉina Popola Respubliko.
- ***Ni ricevis kelkajn faldfoliojn pri la bahá'á religio.*** Ili estas riceveblaj disde la redakcio. Por informiĝi pri tiu religio kontaktu Ali A. Milani, 3/10 Helen St, Lane Cove NSW 2066, Aŭstralio.
- ***Bulgara Esperantisto,*** monata organo de la Bulgara Esperanto-Asocio, estas interesa, ilustrita gazeto el lando malmulte konata de aŭstralazianoj. Abono kostas 32 guldenojn (≈AUD$30) kaj estas aranĝebla pere de nia libroservo.
- ***La Muzika Esperanto-Ligo*** eldonas tre modestan bulteneton kiu aperas dufoje jare. Speciale interesa estas traduk-konkurso (ĉifoje tradukendas "La Paloma" [de kiu la hispana teksto kaj la muziknotoj estas donitaj]). La abonprezo estas AUD$16.00, ĉe la Libroservo. Por informoj kontaktu la aŭstralazian reprezentanton, Kay Andersen, 19 Sherley St, Moorooka Qld 4105.
- ***Esperanta Ŝak-Ligo Internacia*** serĉas membrojn. Oni povas partopreni en korespondaj ludoj kaj turneoj, kaj la Ligo eldonas kvaronjaran bultenon. ✉ Saulius Miliunas, str. Partizanu 154-1. LT-3041 Kaunas, Litovio.
- ***Ĉifoja rikolto de "eksanglaj" vortoj*** trovitaj en la esperanta gazetaro: *vesterno* = Wild West film (*Kontakto* 1992:4/ 5); *Lo* = Saluton (por komenci pertelefonan konversacion) (*Kontakto* 1992:6); *top-manaĝisto* = top manager [general manager] (*Eventoj* 1992 oktobro (2));
- ***Inter novaj esprimoj kaj terminoj uzindaj*** ni trovis en *El Popola Ĉinio* 1992/12 "spaconaŭtiko", utila apud "aeronaŭtiko", "astronaŭto" kaj la originala, klasika "argonaŭtoj".
- ***Scienca Revuo estas*** eldonata de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. Inter la artikoloj en 1992: "Melanomo — La plej danĝera haŭtkancero", "Lexicon Silvestre — Multlingva vortaro de forsta fako", "Sismologio kaj kontraŭtertrema protekto en Albanio", "La molekula bazo de kanceriĝo", "Interago de vitamino A kaj imunostimuliloj", "Pri la emocia ploro", kc. Abono kostas 25 svisajn frankojn (≈AUD$32 de nia Libroservo). Kontaktadreso: R. Hauger, Ringstrasse 13, CH-8172 Niederglatt, Svislando.
- ***Odlo Bokserp honorita en Hispanio!*** En la novembro-decembra numero de la *Bulteno* de la Hispana Esperanto-Federacio ni legis: "Kun bedaŭro ni konstatis, ke pasintnumere, eble profitante la ferimalstreĉon, aperis petole sur la paĝoj de "Boletín" la preskoboldo netolereble aŭdace: sur la pĝ...." Ni gratulas Odlon. [Bonvolu noti ke ĉi tiu honoranonco aperas en la sama litergrandeco kiel tiu en la hispana gazeto.—]
- ***La gazeton*** **Kontakto** ***minacas morto.*** Gis nun ĝian grandan deficiton pagas UEA, sed en la Valencia UK la UEA-Komitato diskutos malfondi ĝin. Pro sia nova redaktoro

Franĉjo Veuthey, *Kontakto* estas unu el niaj plej legindaj periodaĵoj, kun intereso ne nur por gejunuloj. Se vin interesas koni nian Esperantan kulturon, konsideru aboni *Kontakton.* (Por aranĝi abonon kontaktu nian Libroservon aŭ la UEA-ĉefdelegiton vialandan.)

- ***Memori kaj forgesi,*** la nova libro de Trevor Steele, nun haveblas de nia Libroservo. La prezo estas AUD$31.70 + $1.10 por poŝtkostoj.

18-a kaj 19a internaciaj semajnoj de Esperanto

Centre Culturel Esperanto de Montpellier (Francio)

Pro niaj pasintjaraj sukcesoj, ni organizos dum la venonta [nordhemisfera] somero du internaciajn semajnojn kiuj okazos:

21-28 aŭgusto 1993, meze de kamparoj kaj arbaroj, en alpa vilaĝeto Habères-Poche; kaj

4-11 septembro 1993 en bela parko apud la maro, en la havenurbo Sète.

Ni proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto. Ni havos diversnivelajn kursojn gvidatajn de eminentaj geinstruistoj inter kiuj Pierre Babin, Daniel Moirand, Alain Favre. Ankaŭ: interacia etoso, naĝado, promenadoj, ekskursoj, vizitoj, kantado, interesaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo. Tre modesta restadokosto; ambaŭ restadejoj taŭgas por rulseĝuloj; eblas tendumi proksime. ✉ Centre Culturel Esperanto de Montpellier, 5 Rue du Docteur Roux, 34000 Montpellier, Francio.

NOVA AŬSTRALIA LIBRO

Mi ĵus finis la verkadon de eta originala libro en Esperanto: *La Nekoruptebla Patrioto kaj Administristino.* Ĝi enhavas famajn citaĵojn kaj du epopeajn poemojn (tute sen romantikaj aŭ ŝovinismegaj eroj). La unua poemo temas la triumfon de idealismo super mono. La dua temas "La vizion, kiun Vilhelmo Blake forgesis". La libro estas ankaŭ bele (kaj morale) ilustrita; la bildoj estas tiel bonaj, kiel la poemoj. Mi vendas ekzemplerojn de *La Nekoruptebla Patrioto kaj Administristino* po $3.00, kaj tiu prezo enhavas la poŝtkoston!

Mendu de Ŝer Reĉi, 59 Yurongi Str, Caravonica Qld 4878.

HISTORY OF ESPERANTO IN NEW ZEALAND

La Estraro de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio nun estas preta akcepti mendojn por la *History of Esperanto in New Zealand* (dua parto, 1964-1985) kompilita de Audrey kaj Fred Wood DBEA, 1992.

Prezoj: Ruĝe bindita kun oraj literoj (simile al la Unua Parto, 1904-1963) NZ$55.00. Spirale bindita kun plasta kovrilo NZ$20.00. La prezoj inkludas sendkoston.

Bonvolu sendi monon kun via mendo al: La Sekretariino, NZEA, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003, Nov-Zelando.

NZEA KONGRESO
RAPORTAS BRIAN FOX

La ĉeesto de Profesoro So Gilsu de UEA vigligis la kongreson. Li parolis pri Azio, kaj la sukcesoj kaj la malfacilaĵoj de sia agado por Esperanto en tiu regiono. La kvar vizitantoj el Azio donis internaciecon al nia Esperantio.

Unu sesio diskutis planojn por la ebla Universala Kongreso en Adelajdo en 1997, kaj postkongresa ekskurso en Nov-Zelando. Ideoj estis vizitoj al geotermaj spektakloj, vulkano, historiaĵoj pri renkontiĝo de Eŭropanoj kaj Maorioj, maoria kulturo, indiĝena pluvarbaro, skiado, Suda Alparo. Kaj ŝafoj.

La kongresanoj tre ĝuis la tri ekskursojn: krozo sur rivero, tuttago en la sulfura vaporo kaj bolanta koto de Rotorua, kaj vizito al ekspona ĝardeno. La 28 kongresanoj kaj vizitantoj pretendas ke ĉi tiu estas la plej amikeca kongreso dum longa tempo.

Por spekti kaj legi estis ekzemplero de la dua parto de la Historio de Esperanto en Nov-Zelando, kiun faris Audrey kaj Fred Wood. Oni povas mendi propran ekzempleron de la Sekretariino de NZEA.

La Estraro prezentis al Mary Richardson kaj Jozefo Major pletojn kaj vinpokalojn por danki ilin pro la longtempa laboro por *Novzelanda Esperantisto* kaj por la movado.

Jen la balotado por nova Estraro: Prezidanto Brian Fox, Sekretariino Jo Knight, Kasistino Jackie Fox, Vicprezidanto Dennis Pease, Helpsekretario Derrick Knight, Estraranoj Herb Sweney kaj Dave Rockell. (Jim Baker translokiĝis al Malajzio.)

La sekvanta kongreso okazos en Aŭklando dum la unua semajno de januaro 1994. ❑



EL LA REGIONOJ

Nov-Zelando—Wellington: La unua 1993-kunveno de la Esperanto-Rondo de Wellington okazis la 10an de februaro kaj 13 membroj estis bonvenigitaj de la Prezidanto, S-ro Bill Aldridge. Tre interesan paroladon pri sia vojaĝo al Eŭropo prezentis S-ro Jozefo Major, kiu kondukis nin al Londono, kie li kaj Eva salutis malnovajn kaj novajn geamikojn ĉe la Londona Klubo; al Vieno, kie ili kompreneble ĉeestis la Universalan Kongreson; al Prago, kaj pri tiu estis iomete da diskutado—ĉu oni nun nomas ĝin ĉefurbo de Bohemio?; al Budapeŝto, kie, kiel hungaroj, ili tre malfeliĉiĝis rilate la nuntempan ekonomian situacion; kaj ŝajne en ĉiu loko ili suferis pro la varmeco. De ni Novzelandanoj, kiuj suferas preskaŭ

ne-okazantan someron ili ricevis malabundajn kondolencojn! Ili revenis al Londono, de kie ili flugis al Usono, kaj en San Francisko Jozefo prelegis al la samideanoj antaŭ ol reveni al siaj geamikoj en Nov-Zelando. Dankon, Jozefo, pro informplena kaj pensiga programo. [Informojn sendis Mary Richardson.]

Aŭstralio—Adelajdo: Sabaton la 13-an de februaro okazis manifestacio kontraŭ rasismo, kiun partoprenis sep samideanoj de Sudaŭstralia Esperanto- socio. Ni montris la flagon kaj kontraŭrasisman afiŝon. La 27-an de februaro denove okazos manifestacio kontraŭ rasismo antaŭ la Parlamentejo en Adelajdo.

[Laŭ *Tamen Plu* Marto 1993]

Qld: La Esperanto-Federacio de Kvinslando okazigos Konferencon en Montville, 3-4 aprilo 1993. Ejo: Montville Mountain Inn. Kosto: $66 (inkludas liton en dulita ĉambro, vespermanĝon, matenmanĝon, kc.) Eblas partopreni jam ekde vendredonokto. Vin anoncu kiel eble plej frue al Kay Andersen, 19 Sherley St, Moorooka Qld 4105. [Laŭ *La Voĉo* Marto 1993.]

WA: Je la 29a de januaro granda grupo da Esperantistoj rendevuis en la restoracio Seoul por konatiĝi kun Profesoro So Gilsu, delegito de UEA, kiu prizorgas Aziajn aferojn. Tuj antaŭ la renkontiĝo en la restoracio, nia gasto revenis de Hutt River Province, Monkey Mia, kaj Kalbarri, do jam vizitis tre interesan parton de nia ŝtato.—Profesoro So venis el Koreo kaj la leganto jam vidas la ligon kun la restoracio Seoul. Do eblis por ni ricevi detalajn informojn pri la diversaj manĝaĵoj.—Ĉiu havis sian propran gaskuirplaton antaŭ si sur la tablo. Mi mem preferis pretfaritan manĝaĵon. Imagu ke iu rakontus al mia edzino ke mi kuiris! Kion ŝi povus dedukti el tio? Mia ĉefmanĝo konsistis el algo kaj legomoj; tre bongusta.—La profesoro estis akompanata de kelkaj koreaj amikoj kiuj ne parolas la Internacian Lingvon. So Gilsu prezentis nin vice kaj detale al siaj amikoj, kaj inverse, parolante Esperanton kaj tradukante en sian propran lingvon por siaj amikoj. Farante tion, li propagandis Esperanton, montrante ties efikecon.—Ni ĉiuj ĝuis la manĝon kaj la kuneston en Esperanta etoso, kaj ni esperas revidi Profesoron So aŭ en Aŭstralio aŭ en Koreo. [De René Smeets en *La Nigra Cigno,* marto 1993.]

DOROTHY THRELFALL

Je la 2a de januaro, post mallonga resto en hospitalo, mortis nia malnova kaj maljuna ano, Dorothy. Ŝi havis 94 jarojn. Ni rememoras la multajn bonaĵojn kiujn ŝi faris, por la Ligo, por la pac-movado, por la Internacia Ligo de Virinoj por Paco kaj Libereco, por...por tiom da aliaj aferoj. Ni rememoras Dorothy mem, afablan kaj zorgeman, kun brila menso. Ŝi estis ofta kontribuanto por La Nigra Cigno, eĉ lastan jaron ŝi verkis du pensemigajn artikolojn. Restu pace, kara Dorothy.

[Laŭ *La Nigra Cigno*]

Wholly printed in Australia. Computer typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.